

Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj de Sciencuniversitato Loránd Eötvös

(Eötvös Loránd Tudományegyetem Idegennyelvi Továbbképző Központja)

HU-1085 Budapest, Rigó utca 16.

Al

Universala Esperanto-Asocio

S-ro Profesoro Renato Corsetti

prezidanto

Rotterdam

Kara Sinjoro Prezidanto,

La Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj (Idegennyelvi Továbbképző Központ, en la pluaj ITK) - nunaktuale Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj de Sciencuniversitato Loránd Eötvös "ELTE ITK" - funkciigas sian lingvoekzamenan sistemon jam preskaŭ dum kvar jardekoj. Dum la pasintaj jardekoj la sistemo perfektigis kaj maturiĝis. Ĝi fidinde mezuras la lingvoscian nivelon de la ekzamenatoj.

Krom la strikta faka celo – mezurado de la lingvoscia nivelo – ekde la komenco ni celas paralele kune kun la instigo lerni fremdajn lingvojn, emfazi kaj subteni la gravecon de la gepatralingvaj konoj, respektive helpi la trafikon inter la diversaj kulturoj, akceli la interkulturan peradon. Tiun tute ne facilan celadon ni strebas realigi pere de nia dulingva, ŝtate rekonita kaj akreditita ekzamensistemo konsistanta el buŝa kaj skriba partoj. Nuntempe ni ekzamenas kandidatojn en 22 lingvoj, kaj la liston de la ekzamenlingvoj ni deziras ampleksigi per akreditigo de novaj lingvoj.

En ĉiuj lingvoj troviĝas unueca postularo sendepende de tio, kiel granda popolo konsideras ĝin sia propra, do ne ekzistas unua- kaj duarangaj lingvoj ĉe ni. Ĉiuj lingvoj reprezentas valoron, kaj ili riĉigas la mondan kulturon. La egalrajteco de la lingvoj estas garantio por la egalrajteco de la popoloj en la mondo kaj de la opaj homoj.

La bazon de nia ekzamensistemo, emfazanta la dominantecon de la komunikado, pravigas sciencaj esploroj kaj praktikaj spertoj akiritaj dum multaj jaroj.

La detalan priskribon de ekzamensistemo enhavas la suplemento.

Inter la Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj ITK kaj Hungaria Esperanto-Asocio ekzistas intensa kaj fruktodona kunlaboro. ITK alte taksas la kulturmission realigitan de Hungaria Esperanto-Asocio, dume la ekspertoj de HEA partoprenas la funkciigon, popularigon kaj perfektigon de la ekzamensistemo "Origó ITK". Al tiu ĉi praktiko-nivela kaj ĉiutaga kontakto dankeblas, ke la dulingva Esperanto-ekzameno harmonie adaptiĝas al la ekzamensistemo de la vivantaj etnaj lingvoj akredititaj en Hungario. La dulingva Esperanto-ekzameno pruvis sian vivkapablon kaj ekzistorajton per sia faka pretendemo. La nombro de la aliĝintoj al Esperanto-ekzamenoj kreskas energie (en 2004 estis preskaŭ 6000). Ankaŭ la nivelo kaj prestiĝo de la ekzamenoj nepre kontribuis al tio, ke la Hungara Scienca Akademio MTA deklaris Esperanton t. n. ne-etna vivanta lingvo. Per tio malfermiĝis la vojo al la pli larĝa (ĝenerala) socia kaj faka rekonigo de la lingvo Esperanto.

Laŭ la ĉi-supre priskribitaj ni petas la Universalan Esperanto-Asocion rekonu la dulingvajn Esperanto-ekzamenojn ELTE ITK Origó. Ni petas plue, bonvolu ankaŭ ĉe aliaj internaciaj organizaĵoj iniciati la rekonon de tiu ĉi dulingva ekzamensistemo, kiel rimedo por realigi egalrajtecon inter la naciaj lingvoj.

Budapeŝto, la 20-an de julio, 2005.

D-rino Katalin Gáborján
direktorino de ITK

Imre Szabó
vicprezidanto por Esperanto-ekzamenoj

SUPLEMENTO

Informoj pri la dulingva ekzamensistemo ELTE ITK ORIGÓ

Verkis Faka laborgrupo de ITK.

Redaktis D-rino Lucia Katona.

Esperantigis Imre Szabó.

1-a ĉapitro

NIA KREDO

Tradicio kaj moderneco, laŭ tiu ĉi duobla devizo strebas la gvidantaro kaj kunlaborantaro de Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj ITK, ke nia ekzamensistemo Origó konformiĝu al la postuloj de la akreditado, al la kondiĉoj de la ŝanĝiĝanta medio, al la justaj deziroj de la ekzamenatoj kaj al la pretendoj de la moderneco.

La fido de niaj ekzamenatoj estas por ni honoro, kiun ni konsideras nia plej valora kapitalo, kiun rezervi estas nia intensa respondeco.

Ni fieras pri la atingitaj rezultoj, kiuj donas esperon al la plua laboro kaj stimulas nin al pluaj fortostreĉoj.

MALLONGA HISTORIO

La Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj ITK kun du profiloj – instruado kaj ekzamenado – ekfunkciis la 1-an de septembro 1967 kiel instituto reviziata de Sciencuniversitato Loránd Eötvös ELTE. Samjare ministra dekreto pri sistemo de lingvoekzamenoj fondis la *Ŝtatan Lingvoekzamenan Komisionon ANYB* funkciigatan de ITK.

ITK komence grandparte okupiĝis pri instruado. Ni organizis kursojn en 5 lingvoj por plenkreskuloj kun maturiĝa ekzameno. La 1000-persona studentaro per konscia instru- kaj ekzamenpolitiko malpliigis al 500 homoj en la dua duono de la 90-aj jaroj, kiam ni emfazis la pligraviĝintan lingvoekzamenadon kreante el niaj propraj studentoj kontrolgrupojn necesajn al la esploroj de lingvoekzamen-evoluigo. Dume kreskis la interesiĝo pri niaj ŝtataj lingvoekzamenoj: en 1967 ni registris nur 5591 ekzamenatojn en 6 lingvoj, en 1997 eblis trapasi ekzamenojn jam en 52 lingvoj, kaj la nombro de la ekzamenoj atingis 104000. La vere dinamika kresko spertebblas ekde la komenco de la 90-aj jaroj, kiam la antaŭa, preskaŭ la unusola privilegio, la kromsalajro pro lingvoekzameno ampleksiĝis per novaj avantaĝoj. Ekde tiam posedantoj de lingvoekzameno povas ricevi de la mezlernejo forpermeson el la lingvaj studhoroj, ili ne devas trapasi la koncernan lingvan parton de la maturiĝa ekzameno, kaj ili akiras plusajn poentojn en la universitataj/altlernejaj priakceptaj ekzamenoj.

Paralele kun la kresko de la ekzamenitaro komenciĝis la regiona decentriĝo de la instituto, kaj tiel ekde la 1980-aj jaroj krom la Budapeŝta centro en strato Rigó 16, oni povas trapasi lingvoekzamenojn en multaj aliaj lokoj. Vice fondiĝis la provincaj sekcioj en la universitatoj de urboj Miskolc, Veszprém, Pécs, Szeged, Debrecen kaj Sopron. Ni kontraktis kun la Asocio de Urboj kun Departementa Rajto, laŭ kiu ankaŭ en 16 urboj departementorajtaj ekeblis ekzameniĝi. Krom ili laŭ la ministra dekreto 11/1990 (X. 4.) MKM ankaŭ ĉ. 40 institutoj de la ekvivalento-listo rajtis organizi lingvoekzamenojn, kvankam ne laŭ la sistemo de ITK, sed la diplomo ekvivalentis kun iu grado de la ŝtata lingvoekzameno.

Same ekde la 90-aj jaroj aperis postulo egalrangigi eksterlandajn lingvoekzamenojn. Pli kaj pli da hungaraj civitanoj trapasis lingvoekzamenojn en renomaj eksterlandaj lingvoekzamenaj centroj, kies diplomojn ili povis ŝtate rekonigi en ITK. Ĉar unu el la plej gravaj karakterizaĵoj de nia ekzamensistemo estas la dulingveco, tial al la egalrangigo ni preskribis tekstojn taŭgajn por mezuri la kapablojn de tradukado el unu lingvo en la alian (ekz. tradukado, resumado, interpretado).

Tamen tiu ĉi vastaskala sistemo (kiu ebligis trapasi ĝeneralan aŭ fakmateriale ampleksigitan lingvoekzamenon en pli ol 50 lingvoj) de ŝtataj lingvoekzamenoj laŭ la senco de registara dekreto 71/1998. (IV. 8.) ĉesis la 31-an de decembro 1999.

Ekde la 1-a de januaro 2000. la nove aliĝintaj ekzamenoj povis trapasi jam nur ŝtate rekonitan lingvoekzamenon en lingvoekzamena centro (kaj en ĝiaj ekzamenlokoj) akreditita de Lingvoekzamenojn Akreditanta Korporacio NYAT. Tre ĝojigis nin, ke en februaro 2000 – unue en Hungario – ni plenumis la akreditajn postulojn (kiujn preskribis la menciita registara dekreto kaj la dekreto 30/1999. (VII. 21.) OM kaj la Akredita Manlibro), kaj NYAT akreditis la lingvoekzamenan sistemon ITK Origó.

Nia akreditita lingvoekzameneja reto intertempe signife ampleksiĝis, ja krom la Budapeŝta Centro ni havas multe da akredititaj aŭ deklaritaj lingvoekzamenaj lokoj. Tiu energia evoluo evidente paralelis kun la kresko de la nombro de la ekzamenoj. La taskojn de lingvoekzamenado plenumas pli ol 1000 fakuloj.

La lingvoekzamena aktivado de ITK ricevis altan rekonon en 1999, kiam la Asocio de Lingvokono-Testantoj en Eŭropo (ALTE) akceptis ĝin sia asociiĝinta membro. Estas honorige por ni, ke en tiu organizo ni sola reprezentas la lingvoekzamenadon en Hungario.

LA LINGVOEKZAMENA SISTEMO

Dum sia preskaŭ 40-jara ekzisto ITK evoluigis kaj funkciigis tri lingvoekzamenajn sistemojn pere de la Ŝtata Lingvoekzamena Komisiono. Ni strebis ellabori niajn ekzamenojn ĉiam konsiderante la realajn postulojn de la aplikado. La ŝanĝiĝo de nia lingvoekzamena sistemo bone montras tiun nerompitan evoluon, kiun ni realigis de la tradicia, latinkaraktara pridemandado (kono de la gramatikaj strukturoj, tradukado kaj kompreno de legata teksto) ĝis la enkonduko de komunikiĝa lingvoekzamenado. La unuaj gravaj ŝanĝoj okazis en 1980 kaj en 1991, kiam la ekzamensistemon ni relaboris en la spirito de la moderna lingvistika koncepto, kiu la lingvon konsideras komunikilo kaj laŭ la novaj modeloj de scio de fremda lingvo, ĉar ni celis enkonduki ekzamensistemon pli konvenan al la bezonoj de la aplikantoj, pli kontentigan al la aktualaj sociaj pretendoj, respegulantan ankaŭ la ŝanĝiĝantajn postulojn de la komunikiĝa lingvoinstruado. Verŝajne ankaŭ en la tria jarmilo validos plu la laŭmodula sistemo de la lingvoekzamenoj (A-, B- kaj C-ekzamenoj), kiu ebligas, ke la ekzamenoj – ene de du kalendaraj jaroj – ankaŭ aparte povu trapasi siajn buŝan kaj skriban ekzamenojn.

*La nocio de fremdlingva scio mezurata en la nuna ekzamensistemo de ITK formiĝis laŭ la konstatoj de la plej novaj esploroj de aplikata lingvistiko, laŭ la ŝanĝiĝintaj celdifinoj de la komunikiĝa lingvoinstruado kaj laŭ la analizo de bezonoj kaj necesoj de la uzantoj de la diplomoj pri lingvoekzameno. La teorian bazon de nia mezurado pri fremdlingvo-scio donas unuflanke la Bachman-modelo (piednoto: Bachman, L. F. (1990). *Fundamental Considerations in Language Testing*. Oxford. Oxford University Press.) vaste akceptita en la lingvoekzamena fako, aliflanke la rekomendoj de la ampleksaj fremdlingvo-instrua- kaj ekzamena projekto de Eŭropa Konsilio. Kiel asociiĝinta membro ITK akceptis la nocion pri komunikiĝa kompetenteco difinitan de ALTE, kiu apogas sin sur la Komunana Eŭropan lingvoinstruan kaj lingvoekzamenan kadrosistemon (piednoto: Council of Europe-Council Cultural Co-operation Education Committee (1998). *Modern Languages: Learning, Teaching, Assesment. A Common European Framework of Reference*. Strasbourg. Council of Europe.). ALTE ellaboris detale ĝis nun por tri niveloj la postularon pri pretendebla lingvoscio. Tiuj priskriboj de niveloj naskiĝis en la spirito de lingvaj celadoj de fremdlingva projekto de EK, kaj eksplicite ili ligiĝas al la Enpaŝa, Sojla, respektive Meza niveloj de EK (el kiuj niveloj la du lastaj kongruas kun niaj baza kaj meza niveloj – vidu la tabelon n-ro 1.).*

Tabelo n-ro 1: Komparo de la ekzamensistemo ITK kun la niveloj de la ŝtate rekonitaj lingvoekzamenoj kaj kun la sesgrada skalo de EK:

Ŝtate rekonitaj lingvoekzamenoj – Lingvoekzamenaj niveloj de ITK	Niveloj de la sesgrada skalo de Eŭropa Konsilio
Supera grado – ITK supera grado	Majstra nivelo
	Progresiva nivelo
Meza grado – ITK meza grado	Meza nivelo
Baza grado – ITK baza grado	Sojla nivelo
Ne akreditebla – Enpaŝa nivelo (nur en la hungara kiel fremda lingvo)	Enpaŝa nivelo
Ne akreditebla	Minimuma nivelo

TIPOJ DE EKZAMENOJ

La Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj ITK organizas nivelgotipajn, laŭmodulajn *dulingvajn ekzamenojn* kun ĝeneralaj konoj sur tri niveloj (baza, meza kaj supera gradoj), respektive en la hungara kiel fremda lingvo oni povas trapasi *unulingvan ekzamenon* sur baza, meza kaj supera niveloj, respektive sur enpaŝa nivelo. Nuntempe en la lingvoekzamena sistemo ITK oni povas trapasi ŝtate rekonitan ekzamenon pri la lingvoj

- angla, bulgara, Esperanto, franca, germana, hispana, itala, kroata, lovaria (cigana), pola, rumana, rusa, serba, slovaka, ktp. respektive latina (dulingvaj ekzamenoj),
- pri la hungara kiel fremda lingvo (unulingva ekzameno).

Rimarko: en ITK nuntempe oni ne povas trapasi ŝtate rekonitan fakan lingvoekzamenon.

La ekzamenoj estas laŭtipo *niveligaj*, ĉar sendepende de la instrumaterialo, instrumentoj, instruplano kaj uzita lernotempo de la fremda lingvo ili mezuras la lingvoscion laŭ unueca postularo komplekse. La postularo de la fremdlingva plenumaĵo pretendita de niaj ekzamenitoj (vidu en la ĉapitro n-ro 5!) baziĝas sur moderna koncepto de fremdlingvo-scio, el kiu ni prenas – pere de niaj ekzamentaskoj – reprezentantan lingvan modelon, kaj tiel ebligas testi plej multflanke, plej ĝisfunde la lingvoscion de la ekzamenatoj.

La lingvoekzamena sistemo ITK estas *laŭmodula*, tio estas, ke sur la baza, meza kaj supera niveloj oni povas trapasi 3 tipojn (A, B kaj C). La *tipo A* signifas en ĉiuj gradoj, ke la kandidato trapasas ekzamenojn el taskoj mezurantaj parolkomprenon + parolkapablon. La *tipo B* sur ĉiuj niveloj signifas, ke per la helpo de presitaj vortaroj la ekzamenito solvas taskojn mezurantajn skribkapablon + komprenon de legata teksto, respektive sur meza kaj supera gradoj sen vortaro leksikan teston de 50 unuoj. La *tipo C* sur ĉiuj niveloj signifas, ke la ekzamenito solvas taskojn mezurantajn ĉiujn kvar kapablojn (parolkompreno, parolkapablo, skribkapablo, kompreno de legata teksto). La ekzameno estas sukcesa en ĉiuj tipoj kaj sur ĉiuj niveloj, se la kandidato solvis la taskojn minimume kun 60%-a rezulto. Sub 60%-oj en la informa letero ni sciigas la ekzameniton, ke la plenumo estis nesufiĉa.

En la dulingva sistemo – kies detalan priskribon prezentas la 2-a ĉapitro – la daŭro de la A-tipaj ekzamenoj estas sur baza nivelo 10 minutoj, sur meza nivelo 15 minutoj, sur supera 20 minutoj. Por solvi la laboratorian taskon estas je dispono 20 minutoj. La daŭro de la B-tipaj ekzamenoj estas baznivele 1 horo, meznivele 3 kaj duonhoroj, supergrade 4 kaj duonhoroj, el kiuj mez- kaj supergrade por solvi la teston disponiĝas 30 minutoj. La ekzamentaskoj kaj la certigita tempo kaze de la klasika (mortinta) latina lingvo estas iom diferenca disde la sistemo de la vivaj lingvoj.

Laŭ la preskriboj de la Registara Dekreto jare 3-5 fojojn eblas organizi skribajn ekzamenojn, ITK ofertas kadre de tiu limigo la maksimumon: 5 fojojn (pri la konkretaj datoj ni informas precize en nia senpaga informilo kun la aliĝilo). Krom en la monatoj de la skribaj ekzamenoj ni organizas buŝajn ekzamenojn ankaŭ en monatoj februaro, aprilo, majo, oktobro kaj decembro.

PROCEZO DE LA LINGVOEKZAMENO

La ekzamenojn ITK plenumas tiuj kvalifikitaj (kaj kontinue plukvalifikitaj) ekzamenantoj, kiuj eniris la ekzamenantaran liston de la ekzamencentro. La lingvoekzameno konsistas el du partoj: el *buŝa ekzameno*, kiu mezuras la parolkapablon kaj la parolkomprenan kapablon (ties parto estas, sur meza kaj supera gradoj, ankaŭ la skriba tasko aranĝata aparte en laboratorio helpe de maŝinparolo – aŭdkasedo), respektive el *skriba ekzameno*, kiu mezuras la komprenon de skribita teksto kaj la skribkapablon.

La *buŝan (parolan) ekzamenadon* plenumas dupersona komisiono (kiel kontrolanto povas ĉeesti la prezidanto-direktoro, la laŭlingve kompetenta vicprezidanto aŭ ĉefekzamenanto). Buŝaj ekzamenoj okazas en la ekzamencentro kaj en la ekzamenlokoj. Ekzameni rajtas ĉiu persono rolanta en la ekzamenantara listo de la centro kaj taŭga laŭ la ekzamenistaj kriterioj. La korektadon de la ekzamentasko parolkompreno aranĝita – per la helpo de taskfolio – aparte disde la buŝa ekzameno, tamen rolanta kiel ĝia parto, plenumas tria ekzamenanto, kiu ne aktive partoprenas la parolkapablon mezurantan parton de la buŝa ekzameno.

Skribaj ekzamenoj okazas jare do 5 fojojn en la dato kaj laŭ la maniero difinita de la ekzamencentro. Tiuj ekzamenoj plenumiĝas en la ekzamencentro kaj en ĉiuj ekzamenlokoj samtempe. En la skribaj ekzamenoj (krom la respondelekta testaro) al la solvo de ĉiuj taskoj eblas uzi presitajn, unu- aŭ dulingvajn vortarojn. La taskfolioj laŭnivele estas malsamkoloraj, kaj ili povas havi fotojn aŭ grafikaĵojn. La taskfolioj ne montras la fontojn de aŭtentikaj aŭ parte redaktitaj tekstoj, sed la ekzamencentro registras ilin. La ekzamenlokoj transigas la skribajn ekzamenajojn al la ekzamencentro sub striktaj sekurecaj preskriboj.

La korektadon de la ekzamenlaboraĵoj plenumas – laŭ anticipe preparita instrukciaro – ekspertoj de la ekzamencentro. Por certigi la unuecan korektadon ĉiuj ekzamenantoj analizas kelkajn ekzamenajojn, kolektas la malĝustaĵojn kaj partoprenas la teamkunsidon, kie ili interkonsentas pri la poentoj depreneblaj pro malĝustaĵoj netipaj kaj karakterizantaj nur la koncernan ekzamenajojn. Dum la korektado ili devas agi laŭ la decidoj de la teamkunsido. Pri la tipaj malĝustaĵoj kaj depreneblaj poentoj preparis la kunlaborantoj de ITK detalan liston, kiu disponeblas ankaŭ por la vasta publiko en niaj kelkaj eldonaĵoj. (Fekete, Fonyódi kaj aliaj: *Írásbeli feladatok a nyelvvizsgán – angol* ['Skribaj taskoj en la lingvoekzameno – angla'], Budapeŝto, Eld. Akadémiai, 1998; Gáborjárné, Horváth kaj aliaj: *Írásbeli feladatok a nyelvvizsgán – német* ['Skribaj taskoj en la lingvoekzameno – germana'], Budapeŝto, Eld. Akadémiai, 1998.)

KONTROLADO DE LA BUŜAJ KAJ SKRIBAJ EKZAMENOJ

La buŝan ekzamenon la vicprezidanto aŭ ĉefekzamenanto laŭ hazarda provo regule kontrolas. La hazardprove regulan kontroladon de la jam korektitaj ekzamenajoj plenumas la teamgvidantoj kaj la vicprezidantoj, kiuj fine pritaksas la korektadon. Pri la rezulto de la reviziado informas la ekzamencentro la ekzamenanton, kaj pro la preteratento de la reguloj de ekzamenado kaj korektado povas okazi maldungo de la ekzamenanto.

ATINGEBLAJ POENTONUMEROJ EN LA ŜTATE REKONITAJ ĜENERALAJ DULINGVAJ LINGVOEKZAMENOJ

Baza grado	tipo A	60 poentoj	(minimume 36)	tipo B	100 poentoj	(minimume 60)
Meza grado	tipo A	70 poentoj	(minimume 42)			
	tipo B	100 poentoj	(minimume 60)			
Supera grado	tipo A	85 poentoj	(minimume 51)	tipo B	100 poentoj	(minimume 60)

REZULTOJ DE LA EKZAMENO

La rezultoj de la ekzameno konsistas el du partoj, el la partorezultoj de la buŝa kaj skriba ekzamenoj. La buŝa kaj la skriba ekzamenoj kune formas la kompleksan C-ekzamenon. Aparte trapaseblas nur buŝa (A-tipa) ekzameno, respektive nur skriba (B-tipa). La ekzameno (en ĉiuj tri tipoj) estas sukcesa, se la ekzamenito plenumis entute *60%-ojn* aŭ pli. La rezulto de la ekzameno estas *En la lingvoekzameno*

sukcesis, respektive *En la lingvoekzameno ne sukcesis*, kaj la poentoj aperas paralele detaligite laŭ la opaj taskoj.

La ekzamenito povas ricevi anticipan – ne oficialan – informon pri la ekzamenrezulto persone, ĉe la telefona informservo aŭ el la rapidlisto afiŝita tuj post la buŝa ekzameno, aŭ pere de interreto, sur la hejmpaĝo de la ekzamencentro tiel, ke la ekzamenito donas sian personan – sekretan – kodon ricevitan ĉe la aliĝo al la ekzameno.

Post la korektado de la ekzamenajoj kaj post la plenumo de la administraj farendajoj, ok-dek semajnojn post la ekzamendato perpoŝte ricevas la ekzamenito la diplomon.

CERTIGO DE KVALITO

La principojn de kvalitocertigo la ekzamencentro plej strikte plenumas (kaj plenumigas en siaj ekzamenlokoj) dum la tuta procezo de la ekzamenado (ekde la preparo de la ekzamentaskoj tra la aranĝo kaj la pritakso de la ekzamenoj ĝis la plenumo de la administraj farendajoj kaj ĝis la regula trejnado de la ekzamenantoj).

La skribaj ekzamentaskoj estas sennomaj, ili portas kodnumerojn, sekve la persono de la ekzamenito restas kaŝita por la ekzamenanto. La plenumon de la ekzamenoj zorgeme kaj daŭre inspektas personaro trejnita por tiu tasko. ITK regule kontrolas ankaŭ siajn akredititajn kaj registritajn ekzamenlokojn, kun speciala atento pri la fakaj-etikaj vidpunktoj, respektive pri la senresta realigo de la sekretigaj procedoj.

ALIĜO AL LA LINGVOEKZAMENO

La ŝtataj lingvoekzamenoj laŭ la preskriboj de la registara dekreto 71/1998. (IV. 8.) ĉesis la 31-an de decembro 1999, respektive ene de du jaroj post tiu dato la ekzamenoj estis daŭrigeblaj por tiuj kandidatoj, kiuj ĝis la supera dato aliĝis al ŝtata lingvoekzameno, aŭ/kaj kiuj volis trapasi novan ekzamenon pro malsukcesa ŝtata lingvoekzameno.

La aliĝintoj post la 1-a de januaro 2000 povas trapasi nur *ŝtate rekonitan lingvoekzamenon* en la akredititaj centro kaj ekzamenlokoj de ITK.

La aliĝo al lingvoekzameno ne estas ligitaj al lerniteco, tamen ni akceptas nur la aliĝon de tiuj, kiuj ĉe la aliĝo transpasas la 14-an vivjaron. *Antaŭ la komenco de la ekzameno la ekzamenoto devas pruvi sian personan identecon per validaj persona legitimilo aŭ pasporto kaj doni sian subskribon. Sen aŭtentika pruvo de persona identeco la aliĝinto ne rajtas ekeksameniĝi.*

Por aliĝi al lingvoekzameno oni devas plenigi aliĝilon. Aliĝiloj estas akireblaj en la Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj (HU-1085 Budapeŝto, Rigó utca 16.) kaj en la akredititaj kaj registritaj laborlokoj, aŭ ili estas printeblaj el la hejmpaĝo de ITK (www.itk.hu). Al provincoj laŭ peto ni sendas perpoŝte aliĝilon kaj ĉekon, kondiĉe ke ili sendas afrankitan kaj adresitan respondkoverton.

La aliĝilo estas plenigenda *legeble, prefere per presitaj, majuskulaj literoj*, respektive la dezirata parto devas esti ĉirkaŭringita. Oni devas aliĝi al lingvo, nivelo kaj al anticipe difinita dato. Per unu formularo eblas aliĝi nur al unu tipo de iu nivelo. Se oni deziras ekzameniĝi pri pluraj lingvoj aŭ deziras ekzameniĝi en pluraj lokoj en sama periodo, bonvolu priatenti, ke la ekzamendatoj povas koincidi.

Post la pleniĝo de la aliĝilo pagu la ekzamenkotizon per la ricevita ĉeko. Se la aliĝilon vi printis el la hejmpaĝo, post la pleniĝo de la aliĝilo kotizu per poŝta mandato.

Atenton! Sur la poŝta enpagilo nepre devas aperi:

Fakturnumero: 10032000-01731794

Fakturposedanto: Idegennyelvi Továbbképző Központ, Budapest

Kodo de pago: 310

Poste bonvolu la pagatestilon (koncernan ĉekparton) glui sur la ĝustan lokon de la aliĝilo kaj sendu ĝin *AL TIU INSTITUTO, EN KIU VI DEZIRAS EKZAMENIĜI!*

Ni alvokas la atenton, ke ni akceptas aliĝilojn nur kun originala pagatestilo, kaj ni ne povas ĝin transsendi al alia ekzamenloko. La sen pagatestilo alvenintajn aŭ malĝuste aŭ manke plenigitajn aliĝilojn ni resendadas, kaj ni alkalkulas kromkotizon. Ni proponas fari fotokopion pri la aliĝilo kun la pagatestilo por havi dokumenton kaze de eventuala reklamacio.

LIMDATO DE ALIĜO

Oni devas aliĝi al ekzameno (minimуме) ses semajnojn antaŭ la ekzamenmonato. Ekzemple por junia ekzameniĝo oni devas aliĝi ĝis la 20-a de aprilo. Ni alvokas la atenton, ke urĝan korektadon ni ne entreprenas, tial se vi volas havi lingvoekzamenan diplomon, kalkulu tiel, ke la korektado de la skribaj taskoj daŭras ĉ. 6 semajnojn post la ekzameno, pluse aldonu la tempodaŭron ankaŭ de la perpoŝta alsendo! Konvene al tio ni petas, se vi bezonas la diplomon en monato junio, tiam vi aliĝu al marta ekzameno!

PROKRASO DE EKZAMENO

Se la ekzamenoto ne povas aperi en ekzameno la difinitan tagon, tiam per tiucela formularo li/ŝi povas peti la prokraston de la ekzameno antaŭ la ekzameno aŭ post ĝi ene de 10 tagoj. Prokrasto estas petebla al ekzamenperiodo ene de 6 monatoj post la unua ekzamendato kontraŭ la pago de 2000 Ft kromkotizo. Prokrasto de ekzameno estas donebla nur unu fojon.

KROMKOTIZO

Por preparigi aŭtentikan kopion pri la diplomo aŭ kaze de petoj postulantaj plusan administradon oni devas kromkotizi 1000 aŭ 2000 forintojn.

INFORMIĜO PRI LA REZULTOJ

La rezultojn de la buŝaj ekzamenoj ankoraŭ en la ekzamentagoj ni afiŝas en la ekzamenlokoj (aŭ post 2-3 tagoj en la reto). Pri la rezultoj de la laboratoria tasko (magnetofonaŭskultado) post *du semajnoj*; pri tiuj de la skribaj taskoj post la sepa semajno eblas informiĝi en la reto (www.itk.hu) aŭ telefone ĉe la Budapeŝta Informa Servo (1-459-9600).

REPAGO DE LA EKZAMENKOTIZOJ

Por repagigi la ekzamenkotizon oni devas sendi peton al la direktoro de ITK. Post la prijuĝo ni repagas 40%-ojn de la kotizo. *Por prokrastita ekzameno ni ne repagas kotizojn.*

CETERAJ GRAVAJ SCIINDAĴOJ

Se vi aliĝis al C-tipa ekzameno, sed vi aperis nur en ĝia A- aŭ B-parto, pri la rezulto atingita tie *ni sendas diplomon nur post aparta skriba peto*, tamen tio signifas, ke vi rezignas pri la alia parto de la ekzameno.

Se vi atingis la bezonatan poentonumeron jam antaŭ la komisiono de la buŝa ekzameno, kaj tial vi ne volas partopreni la laboratorian ekzamenon, ni petas, bonvolu komuniki al ni vian pretendon skribe, ja nur en tiu okazo ni povas prepari la diplomon por vi.

Ni alvokas la atenton, ke ajna kontraŭleĝa ago aŭ misuzo koncerne la dokumentojn kaj diplomon de ekzameno estas punenda krimago, kvalifikebla kiel falsado de oficiala dokumento laŭ la 1-a alineo de 274. paragrafo de la Kriminala Kodo.

EBLOJ DE JURISDIKCIA RIPARO

TRARIGARDO DE LA EKZAMENAĴO

La ekzamenito rajtas trarigardi siajn korektitajn skriban taskaron kaj la taskfolion mezurantan la parolkomprenon kaj peti reviziadon pri la malĝustaĵoj, kiuj laŭ li/ŝi estas malĝuste korektitaj. La ekzamenlaboraĵoj kaj la taskfolioj estas trarigardeblaj en la centro ITK inter la 15-30-aj tagoj de la dua monato post la skribo; la majaj-juniaj ekzamenajoj estas trarigardeblaj inter la 10-a kaj 30-a de septembro kaj oktobro. La preteratento de tiu ĉi termino kaŭzas perdon de rajtoj. Por la trarigardo oni devas peti daton de la Informa Servo unu semajnon pli frue. Sendepende de tio, en kiu ekzamenloko ekzameniĝis la ekzamenito, la ekzamenajoj estas trarigradeblaj nur en la centro ITK. La skriba laboraĵo ne estas transdonebla al iu ajn, nek fotokopiebla, nek prinotebla; ĝin rajtas vidi nur la ekzamenito.

APELACIO

Kontraŭ la ekzamena pritakso eblas apelacii nur okaze de kontraŭjuraĵo, ene de 15 tagoj. La apelacion prijuĝas la direktoro de ITK sur la unua nivelo, la gvidanto de Lingvoekzamenojn Akredita Centro NYAK en konsento kun la prezidanto de Lingvoekzamenojn Akredita Korporacio NYAT sur la dua nivelo.

Apelacii rajtas nur mem la ekzamenito (se la ekzamenito estas neplenaĝa, tiam lia/ŝia jura reprezentanto). Lige kun la buŝa ekzameno rajtas apelacii – ene de 15 tagoj – nur tiu ekzamenito, kiu supozas la malobeon al la ekzamenaj reguloj. La pasigo de la limdato signifas perdon de rajto. En ceteraj okazoj ne eblas plendi kontraŭ la prijuĝo de la buŝekzamenaj plenumoj. Peti la ripetadon de la ekzameno ne estas ebla.

PETO PRI REVIZIADO

La ekzamenito rajtas peti la reviziadon de sia trarigardita skriba ekzamenaĵo. La peto pri reviziado – sur la tiucela formularo – ene de 15 tagoj post enmaniĝo de la diplomo aŭ ĝis la fino (16-a horo) de la dua tago post la trarigardo estas prezentbla ĉe la Informa Servo de ITK.

La peton pri reviziado la tripersona revizia komisiono komisiita de dekano de la Filologia Fakultato de Sciencuniversitato Loránd Eötvös “ELTE” analizas kaj retaksas la korektadon de la ekzamenaĵo. Membro de la revizia komisiono ne povas esti tiu, kiu partoprenis la korektadon de la ekzamenaĵo.

Pri la rezulto de la reviziado devas esti informata la ekzamenito ene de 30 tagoj. Kontraŭ la decido de la revizia komisiono ne plu eblas apelacii.

2-a ĉapitro

LA ĜENERALA, DULINGVA EKZAMENSISTEMO DE ITK

Kadre de la dulingva ekzamensistemo de ITK kun ĝenerala lingva materialo nuntempe eblas trapasi ŝtate rekonitajn lingvoekzamenojn pri 22 lingvoj. La postuloj de nia ekzamensistemo – krom la akreditaj preskriboj – konformiĝas kun la vidpunktoj ellaboritaj en la Komuna Eŭropa kadrosistemo de Eŭropa Konsilio kaj aplikataj de Asocio de Lingvotestantoj en Eŭropo (ALTE). Ekzameniĝi eblas sur la sekvaj niveloj:

- baza,
- meza,
- supera gradoj.

VIVAJ FREMDAJ LINGVOJ BAZA GRADO

Tiu ĉi ekzameno baziĝas sur Sojla nivelo (Threshold Level) ellaborita de Eŭropa Konsilio, kaj ĝi mezuras tion, ĉu la ekzamenato kapablas sukcesi en la bazaj situacioj de la ĉiutaga vivo, kaj ĉu li/ŝi kapablas establi sociajn, kulturajn kaj laborkontaktojn en fremdlingva medio. La sukcesa, baznivela ekzameno kreas la bazon por la plupaŝo al la mezgrada ekzameno.

BUŜA (A) EKZAMENO

PAROLKAPABLO KAJ PAROLKOMPRENO

La sukcesa ekzamenato kapablas baznivelaajn lingvajn funkciojn solvi parole en la koncerna fremda lingvo: li/ŝi kapablas doni informojn, raporti pri okazaĵoj, priskribi objektojn kaj personojn, esprimi konvene sian opinion kaj validigi lingve siajn bazajn homajn interesojn.

Kadre de la buŝa ekzameno (la detalan temaron vidu en la 4-a ĉapitro) la ekzamenanto pri mallonga, persona temaro parolas kun la ekzamenato, kiu post tio memstare parolas pri – laŭteme diferenca disde la

intervjuo – bildo elektita anticipe de li/ŝi. Laste li/ŝi ludas kun la ekzamenanto hazarde elektitan, fremdlingvan situacion laŭ hungarlingvaj instrukcioj.

Dum la ekzameno ĝisfine ni mezuras la parolkomprenon kaj interagan kapablon, kiun la ekzameno povas pruvi per tio, ke li/ŝi komprenas la esencon de la demandoj, komunikoj direktitaj al li/ŝi en pli klare artikulaciita kaj pli malrapida ritmo ol la standardo de la cellingvo. La plenumon de la ekzameno ni mezuras laŭ la sekvaj pritaksaj vidpunktoj: komunikiĝa valoro, vorttrezoro, lingva ĝusteco, prononco kaj parolkompreno (la detalan pritaksan skalon vidu en la 5-a ĉapitro).

SKRIBA (B) EKZAMENO

La ekzameno konsistas ĉiam el tri partoj: la unua tasko servas mezuri la legadkapablon, la dua esploras kaj la skribo- kaj la legokapablon, dum la tria nur la skribkapablon. Al la solvo disponiĝas 60 minutoj, kaj uzeblas unu- aŭ dulingvaj vortaroj.

KOMPRENO DE LEGATA TEKSTO

La ekzameno devas kompreni pli simplajn publikinteresajn tekstojn (vojaĝajn informojn, administraciajn preskribojn, ktp), baznivelajn faktokomunikajn tekstojn (informoj, uzinstrukcioj, anoncoj, ktp), mallongajn personajn informojn (personaj letero, mesaĝo). Tiuj estas tiaj (1000-1500 literspacojn longaj) tekstoj, kiujn la ekzameno en cellingva medio povas trafi jam en tre frua fazo de la lingvoinstruado.

La tekstokomprenon en la ekzameno la ekzameno povas pruvi per hungarlingva respondo al hungarlingvaj demandoj pri la koncerna teksto. Laŭ la solvoŝlosilo ĉiuj ĝustaj informoj valoras poento(j)n (el 40 poentoj), sed ĉiuj malĝustaj, miskomprenitaj informoj, aŭ se oni la ĝustan informon donas ne al la konvena demando, kaŭzas deprenon de poento(j).

KOMPRENO DE LEGATA TEKSTO

La dua tasko – kiu kutime (sed ne ĉiam) kongruas kun la unua – estas (en la amplekso de 500-1000 literspacoj) plenigo de mendilo, enketilo aŭ aliĝilo, al kiu kelkfoje oni devas priatenti ankaŭ hungarlingvajn instrukciojn. La ekzameno devas kompreni la fremdlingvan formularon/enketilon kaj adekvate plenigi ĝin. Laŭ la solvoŝlosilo ĉiu ĝusta informo valoras poento(j)n (el 20 poentoj).

SKRIBKAPABLO

En la tria tasko – kiu same povas kongrui kun la antaŭa – laŭ pli-malpli ligitaj instrukcioj la ekzameno devas vortumi kutime 8-10 linian, fremdlingvan leteron (salutkarton, bildkarton). La ekzameno devas skribe solvi bazajn lingvajn funkciojn en la fremda lingvo, ekz. doni informon, raporti pri eventoj, priskribi objektojn kaj personojn, esprimi opinion en adekvata formo.

Ĉe la pritakso (doneblas maksimume 40 poentoj) ni atentis pri 3 vidpunktoj: enhavo, esprimo kaj lingva ĝusteco.

REZULTOJ

Konvene al la rezulto de la ekzameno la ekzamenito ricevas kvalifikon *En la lingvoekzameno sukcesis* aŭ *En la lingvoekzameno ne sukcesis*. Okaze de sukceso la diplomon preparas la Lingvoekzamenojn Akredita Centro NYAK – laŭ la materialo ricevita de ITK – , kaj perpoŝte sendas ĝin ITK, dum la informojn *En la lingvoekzameno ne sukcesis* – kiu same enhavas la partorezultojn de la ekzameno – preparas kaj dissendas ITK.

BAZA NIVelo – RESUMO

Buŝa ekzameno A-tipo (entute 60 poentoj)

Tempodaŭro: ĉ. 10 minutoj

1. Parolkapablo:

Direktita parolado (kun unu el la ekzamenantoj pri ĝenerala temo), ĉ. 3-4 minutoj.

Memstara temekspliko (laŭ bilda stimulo), elekteblas 1 bildo el la tiritaj 2, ĉ. 3-4 minutoj.

Situacia rolludo (preno de unu temo), ĉ. 3-4 minutoj

Entute 45 poentoj, kiuj dividiĝas jene:

komunikiĝa valoro: 15 poentoj (3 x po 5 poentoj),

vorttrezoro: 15 poentoj (3 x po 5 poentoj),

prononco: 5 poentoj (entute por la 3 taskoj),

lingva ĝusteco: 10 poentoj (entute por la 3 taskoj),

parolkompreno: 15 poentoj (entute por la 3 taskoj).

Ĉio sume: 60 poentoj.

2. *Parolkompreno* (laŭ la kompreno de la demandoj kaj komunikoj de la ekzamenanto kaj laŭ la kvalito de la spontaneaj respondoj), daŭre dum la tuta buŝa ekzameno. Entute 15 poentoj.

Skriba ekzameno B-tipo (entute 100 poentoj)

Tempodaŭro: 60 minutoj

Kompreno de legata teksto: respondo hungarlingve al hungarlingvaj demandoj pri aŭtentika fremdlingva teksto, 1000-1500 literspacoj, 40 poentoj.

Kompreno de legata teksto kaj skribkapablo:

plenigo de fremdlingva formularo aŭ enketilo, 500-1000 literspacoj, 20 poentoj.

Leterskribado: pri unu temo laŭ kelkaj instrukciaj vidpunktoj, 8-10 linioj, 40 poentoj.

Buŝa kaj skriba (C-tipo) ekzamenoj entute: 160 poentoj.

MEZA GRADO

Tiu ĉi ekzameno baziĝas sur la specifikajo Sendependa uzanto (Independent User) ellaborita de Eŭropa Konsilio, kaj ĝi mezuras tion, ĉu la ekzamenanto kapablas komplekse kaj lingve subtile krei kaj funkciigi socian, kulturalan aŭ laborkontaktojn en fremdlingva medio. La sukcesa mezgrada ekzameno donas bazon al plupaŝo al la supera grado.

BUŜA (A) EKZAMENO

PAROLKAPABLO

La sukcesa ekzamenanto kapablas parole solvi ĉiun gravan komunikiĝan funkcion en la fremda lingvo: li/ŝi kontinue konversacias pri ĝeneralaj kaj personaj temoj, li/ŝi informas kaj raportas ne nur pri personaj sed ankaŭ pri publikinteresaj eventoj, li/ŝi esprimas sian opinion nuancite kaj kapablas validigi siajn interesojn en lingve kompleksa maniero.

Kadre de la lingva ekzameno (la detalan temaron vidu en la 4-a ĉapitro) la ekzamenanto interparolas komence pri ĝeneralaj temoj kun la ekzamenanto, kiu poste memstare parolas pri antaŭe elektita bildo – kun malsama temo de la konversacio –, li/ŝi vortumas siajn koncernajn impresojn kaj sentojn kaj reagis al la (eventualaj) demandoj de la ekzamenanto. Kiel lastan taskon li/ŝi ludas antaŭe hazarde elektitan, fremdlingvan situacion kun unu el la ekzamenantoj laŭ hungarlingvaj instrukcioj.

La plenumo de la ekzamenanto estas mezurata laŭ la sekvaj vidpunktoj:

komunikiĝa valoro, vorttrezoro, lingva ĝusteco, prononco kaj parolkompreno (la detalan pritaksan skalon vidu en la 5-a ĉapitro).

PAROLKOMPRENO

La ekzameno de la parolkompreno okazas en laboratorio (aŭ en proksimume egalvalora ejo laŭtigita konvene) pere de taskfolio. La ekzamenanto devas kompreni pli longajn personajn aŭ oficialajn dialogojn aŭ informplenajn tekstojn prenitajn el la aŭdvida medio, aŭ publikajn informajn tekstojn, la faktojn kaj komunikajn dezirojn vortumitajn en la tekstoj, kaj li/ŝi devas diferencii inter opinio kaj faktokomunikado.

La ekzamenato tri foje aŭskultas ĉe 1,5-2 minutan, normalritman, redaktitan tekston de la parolata lingvo. La fonto estas la cellingvo. La unua aŭskulto servas la t. n. alkutimiĝon, la konatiĝon kun la akustikaj karakterizaĵoj kaj la ĝeneralan komprenon. Post la dua kaj tria aŭskultoj eblas respondi al la demandoj de la taskfolio. Laŭ la solvoŝlosilo de la tasko akireblas poentoj por ĉiuj ĝustaj informoj (el la 15 poentoj). Por plenumi la taskon estas disponataj 20 minutoj. Al la solvo ne uzeblas vortaro.

SKRIBA (B) EKZAMENO

RESPONDELEKTA GRAMATIKA TESTARO

La ekzamenato unue plenigas testaron de 50 unuoj, por tio uzeblas 30 minutoj. Por solvi la taskon vortaro ne uzeblas.

Per la solvo de la testaro la ekzamenato pruvas la ekziston de la gramatikaj kaj leksikaj konoj bezonataj atingi la mezgradan scionivelon. Ĉiuj ĝustaj solvoj valoras unu poenton, kaj la tiel ricevita sumo (maksimume doneblas 50 poentoj) laŭ konverta tabelo transformiĝas al la fina rezulto de 15 poentoj.

Por solvi la aliajn partojn de la ekzameno estas disponataj 3 horoj, al la solvo de tiuj ĉi tekstoj uzeblas unu- aŭ dulingvaj, presitaj vortaroj.

TRADUKO DE HUNGARA TEKSTO EN FREMDAN LINGVON

Per la solvo de tiu ĉi tasko la kandidato povas prui sian transigan kapablon en la fremda lingvo kaj la aktivan konon de la fremdlingva gramatiko. La tasko estas traduki koheran hungarlingvan tekston (ampleksantan ĉ. 500 literospacojn) en la fremdan lingvon. Ĝi povas esti dialog- aŭ priskrib-karakteraj tekstoj enhavanta variajn gramatikajn strukturojn, sed koncerne la vortrezoron kutime ĝi reduktiĝas al la plej gravaj vortoj kaj esprimoj. Ĉe la verkado/elekto de la tekstoj ni konsideras la kontrastecon, t. e. la gramatikajn, nociojn kaj pensmanierajn diferencojn inter la cel- kaj gepatra lingvoj. La plej grava vidpunkto de la pritaksado estas, kiugrade la ekzamenato sukcesas transigi la hungarlingvajn informojn, respektive, la aperantaj malĝustaĵoj kiumezure malhelpas la komprenblecon de la informoj. La ĉefaj erartipoj estas difinitaj laŭ la opaj lingvoj. Krom la konstantaj pritaksaj elementoj pri la poentumado de la specifaj problemoj de la koncerna tasko decidus la teamkunsido de la kontrolantoj. Laŭ la graveco de la eraroj ni subtrahas poentojn el la maksimume doneblaj 25 poentoj.

DIREKTITA VERKADO

La tasko mezuranta la skribkapablon konsistas el la skribo de letero aŭ verketo. La ekzamenato povas elekti el du diversaj temoj, kaj li/ŝi devas vortumi – laŭ la fiksitaj vidpunktoj – koheran tekston de amplekso de 17-20 linioj.

La sukcesa ekzamenato pruvas per tio, ke li/ŝi kapablas skribe esprimi sian kompleksan komunikan intencon: doni detalan informon, raporti pri eventoj, transigi konvene sian propran opinion kaj tion de aliaj kaj ĝuste uzi tekstonivelajn lingvajn rimedojn. Dum la pritaksado de la tasko ni konsideras la sekvajn 3 vidpunktojn: enhavo, esprimmaniero kaj lingva ĝusteco. Ĉiuj vidpunktoj estas taksataj laŭ skalo de 0 ĝis 5 poentoj; atingeblas maksimume 15 poentoj.

TRADUKO EL FREMDA LINGVO EN LA HUNGARAN

Por komune kontroli la komprenon de legita teksto kaj la transigan kapablon la tasko estas hungarigi 1000-1200 literospacan, aŭtentikan, fremdlingvan tekston (plej ofte gazetartikolon). Tiuj tekstoj temas pri ĝeneralaj temoj. La ĝeneralan nivelon de kulturiteco ili ne transpaŝas eĉ en la kazo de ŝajne sciencaj temoj, tamen ili posedas la karakterizaĵojn de la gazetara lingvaĵo. Do, estas necese kompreni pli komplikajn strukturojn, (pluroble) kunmetitajn frazojn (kaj hungarigi ilin adekvate), respektive ofte ili postulas ankaŭ iom da landkonoj (movadaj konoj).

La sukcesa ekzamenato devas kompreni ĝenerale kaj detale tekstojn kun plej diversaj lingvaj funkcioj kaj enhavoj. Krome li/ŝi devas esti kapabla distingi inter la opinio kaj faktokomuniko, kaj li/ŝi devas ekkoni la komunikan intencon esprimitan en la vortuma maniero. Tion li/ŝi povas prui per kiel eble plej preciza

kaj akurata hungarigo de la komprenita teksto. Ĉe la pritaksado de la tasko laŭ la graveco de la informoĝena eraro ni subtrahas inter 1-3 poentoj (respektive 4 poentojn pro la netradukitaj linioj) el la maksimume eblaj 25 poentoj. La ĉefaj erartipoj estas difinitaj en la opaj lingvoj. Krom la konstantaj elementoj de la pritaksado pri poentumado de la specialaj problemoj de la koncerna teksto decidis la teamkunveno de la kontrolantoj.

TASKO POR KONTROLI LA KOMPRENON DE LEGITA TEKSTO

La dua tasko por mezuri la legkapablon enhavas ĉ. 3000-3200 literspacan fremdlingvan tekston, kies komprenon pruvas la ekzamenato per respondoj al hungarlingvaj demandoj. Por tio la ekzamenato devas ĝenerale kaj detale kompreni la tekston kun plej variaj lingvaj funkcioj kaj enhavoj, krome li/ŝi devas diferencigi la opinion kaj la faktokomunikon, kaj li/ŝi devas ekkoni la komunikan intencon esprimitan per la vortuma maniero. Laŭ la solvoŝlosilo riceveblas poentoj pro ĉiuj ĝustaj informoj (el 20 poentoj).

REZULTOJ

Konvene al la rezulto de la ekzameno la ekzamenito ricevas kvalifikon *En la lingvoekzameno sukcesis* aŭ *En la lingvoekzameno ne sukcesis*. Okaze de sukceso la diplomon preparas la Lingvoekzamenojn Akreditanta Centro NYAK – laŭ la materialo ricevita de ITK –, kaj perpoŝte sendas ĝin ITK, dum la informojn *En la lingvoekzameno ne sukcesis* – kiu same enhavas la partorezultojn de la ekzameno – preparas kaj dissendas ITK.

MEZA NIVELO – RESUMO

Buŝa ekzameno A-tipo (entute 70 poentoj)

Tempodaŭro: ĉ. 15 minutoj

1. Parolkapablo:

Direktita parolado (kun unu el la ekzamenantoj pri ĝenerala temo), ĉ. 7-8 minutoj.

Memstara temekspliko (laŭ bilda stimulo), elekteblas 1 bildo el la tiritaj 2, ĉ. 3-4 minutoj.

Situacia rolludo (preno de unu temo), ĉ. 3-4 minutoj

Entute 55 poentoj, kiuj dividiĝas jene:

komunikiĝa valoro: 15 poentoj (3 x po 5 poentoj),

vortrezoro: 15 poentoj (3 x po 5 poentoj),

lingva ĝusteco: 15 poentoj (3 x po 5 poentoj),

prononco: 5 poentoj (entute por la 3 taskoj),

parolkompreno: 5 poentoj (entute por la 3 taskoj),

parolkompreno (maŝinparolo): 15 poentoj.

Ĉio entute: 70 poentoj.

2. Parolkompreno: trifoja aŭskultado de originala, sed redaktita, cellingva teksto en normala parolritmo kaj solvo de hungarlingva taskfolio de demandoj pri la temo. (Tekstodaŭro: ĉ. 1,5-2 minutoj.)

Entute 15 poentoj.

Skriba ekzameno B-tipo (entute 100 poentoj)

1-a parto: 30 minutoj (sen vortaro)

Respondelekta gramatika testaro (por mezuri gramatikajn kaj leksikajn konojn): 50 unuoj, 15 poentoj.

2-a parto: 180 minutoj (vortaroj uzeblas)

Traduko de hungara teksto en la fremdan lingvon (lingva transigo de kohera teksto konsistigita laŭ kontrastivaj vidpunktoj): ĉ. 500 literspacoj, 25 poentoj.

Direktita verkado: du temoj (letero aŭ verketo) laŭ hungarlingvaj direktivoj: ĉ. 17-20 linioj, 15 poentoj.

Hungarigo el la fremda lingvo: ĝeneraltema, aŭtentika fremdlingva teksto (plej ofte gazetartikolo): ĉ. 1000-1200 literspacoj, 25 poentoj.

Kontroltasko pri kompreno de legata teksto:

respondo hungarlingve al hungarlingvaj demandoj pri aŭtentika fremdlingva teksto: ĉ. 3000-3200 literespacoj, 20 poentoj.

Buŝa kaj skriba (C-tipo) entute: 170 poentoj.

SUPERA GRADO

Tiu ĉi ekzameno baziĝas sur la specifikaĵoj Efika grado (Effective Degree) kaj parte sur Majstrogrado (Mastery Degree) ellaboritaj de Eŭropa Konsilio, kaj ĝi mezuras tion, ĉu la ekzameno kapablas alproksimiĝi al la lingva kaj kultura plenumo de la gepatralingva parolanto en fremdlingva medio. La ekzameno devas posedi fajne nuancitan vortrezoron, riĉan stilan esprimilaron, kaj li devas hejmece moviĝi en la diversaj lingvaj registroj. En la ekzamsistemo de la Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj tiu ĉi ekzameno estas la plej supera atingebla nivelo.

BUŜA (A) EKZAMENO

PAROLKAPABLO

La sukcesa ekzameno kapablas parole solvi ĉiun gravan komunikaĵan funkcion en la fremda lingvo: li/ŝi daŭrigas kontinuan konversacion pri ĝeneralaj kaj personaj temoj, li/ŝi informas, li/ŝi raportas ne nur pri personaj sed ankaŭ pri publikinteresaj eventoj, li/ŝi esprimas sian opinion nuancite kaj kapablas validigi siajn interesojn en lingve kompleksa maniero. Krome li/ŝi kapablas en la publikinteresaj temoj preni starpunkton kaj argumenti sur pli abstrakta nivelo, kaj li/ŝi regas por tio ankaŭ la bezonatajn fremdlingvajn sociokulturajn fonajn konojn.

Kadre de la buŝa ekzameno (la detalan temaron vidu en la 4-a ĉapitro) la ekzamenanto parolas komence pri ĝeneralaj temoj kun la ekzamenato, kiu poste memstare parolas pri antaŭe elektita bildo – kun malsama temo de la konversacio –, li/ŝi vortumas siajn koncernajn impresojn kaj sentojn kaj reagis al la (eventualaj) demandoj de la ekzamenanto. Kiel trian taskon li/ŝi ludas antaŭe hazarde elektitan, fremdlingvan situacion kun unu el la ekzamenantoj laŭ hungarlingvaj instrukcioj, poste fremdlingve li/ŝi resumas la enhavon de – per magnetofono dufoje aŭskultita – hungarlingva gazetartikolo.

La plenumaĵo de la ekzameno estas mezurata laŭ la sekvaj vidpunktoj:

komunikaĵa valoro, vortrezoro, lingva ĝusteco, prononco kaj parolkompreno (la detalan pritaksan skalon vidu en la 5-a ĉapitro).

PAROLKOMPRENO

La ekzameno de la parolkompreno okazas en laboratorio (aŭ en proksimume egalvalora ejo laŭtigita konvene) pere de taskfolio. La ekzameno devas kompreni pli longajn personajn aŭ oficialajn dialogojn aŭ informivajn tekstojn prenitajn el la aŭdvida medio, la faktojn kaj komunikajn dezirojn vortumitajn en la tekstoj, kaj li/ŝi devas diferencigi inter opinio kaj faktokomunikado.

La ekzameno dufoje aŭskultas ĉ. 2,5-3 minutan, normalritman, redaktitan tekston de parolata lingvo. La fonto estas la cello. Post la unua kaj dua aŭskultoj li/ŝi devas respondi al la hungarlingvaj demandoj de la taskfolio. Laŭ la solvoŝlosilo de la tasko akireblas poentoj por ĉiuj ĝustaj informoj (el la 15 poentoj). Por plenumi la taskon estas disponataj 20 minutoj. Al la solvo ne estas uzebla vortaro.

SKRIBA (B) EKZAMENO

RESPONDELEKTA GRAMATIKA (KAJ LEKSIKA) TESTARO

La ekzameno unue plenigas gramatikan kaj leksikan testaron de 50 unuoj, por kio uzeblas 30 minutoj. Por solvi la taskon vortaro ne uzeblas.

Per la solvo de la testaro la ekzameno pruvas la ekziston de la gramatikaj kaj leksikaj konoj bezonataj atingi la superagradan scionivelon. Ĉiuj ĝustaj solvoj valoras unu poenton, kaj la tiel ricevita sumo (maksimume 50 poentojn) laŭ konverta tabelo transformiĝas al la fina rezulto de 15 poentoj.

Por solvi la aliajn partojn de la ekzameno estas disponataj 4 horoj, kaj al la solvo de tiuj ĉi tekstoj uzeblas unu- aŭ dulingvaj, presitaj vortaroj.

KONCIZIGO DE HUNGARA TEKSTO EN FREMDA LINGVO

Per la solvo de tiu ĉi tasko la kandidato povas pruvi la ekziston de sia transiga kapablo en la fremda lingvo kaj la aktivan konon de la fremdlingva gramatiko. La tasko estas duonamplekse resumi ĝeneralteman hungarlingvan tekston (ampleksantan ĉ. 2000-2200 literospacojn) en la fremda lingvo – laŭ 5 orientigaj, hungarlingvaj demandoj. La teksto estas priskrib-karaktera, aŭtentika gazetartikolo enhavanta variajn gramatikajn strukturojn kaj vorttrezoron. Ĉe la verkado/elekto de la tekstoj ni konsideras la kontrastecon, t. e. la gramatikajn, nociojn kaj pensmanierajn diferencojn inter la cel- kaj la gepatra lingvoj.

Dum la pritaksado de la tasko ni priententigas 3 vidpunktojn: enhavo, esprimmaniero kaj lingva ĝusteco. Al la tasko maksimume estas doneblaj 25 poentoj.

DIREKTITA KONCEPTAĴO

La tasko mezuranta la skribkapablon konsistas el skribo de letero aŭ verketo. La ekzamenato povas elekti el du diversaj temoj, kaj li/ŝi devas vortumi – laŭ la fiksitaj vidpunktoj – koheran tekston de amplekso de 22-25 linioj.

La sukcesa ekzamenato pruvas per tio, ke li/ŝi kapablas skribe esprimi sian kompleksan komunikan intencon en la fremda lingvo: doni detalan informon, raporti pri eventoj, transigi konvene sian propran opinion kaj tion de aliaj kaj ĝuste uzi tekstonivelajn lingvajn rimedojn.

Dum la pritaksado de la tasko ni konsideras la sekvajn 3 vidpunktojn: enhavo, esprimmaniero kaj lingva ĝusteco. Ĉiuj vidpunktoj estas taksataj laŭ skalo de 0 ĝis 5 poentoj, atingeblas maksimume 15 poentoj.

TRADUKO EL FREMDA LINGVO EN LA HUNGARAN

Por komune kontroli la komprenon de legita teksto kaj la transigan kapablon la tasko estas hungarigi ĉ. 1600 literospacan, aŭtentikan, fremdlingvan tekston (plej ofte gazetartikolon). Tiuj tekstoj enhavas ĝeneralajn temojn, la ĝeneralan nivelon de kulturiteco ili ne transpaŝas eĉ en la kazo de ŝajne sciencaj temoj, tamen ili posedas la karakterizaĵojn de la gazetara lingvaĵo. Do, estas necese kompreni pli komplikajn strukturojn, (pluroble) kunmetitajn frazojn (kaj hungarigi ilin adekvate), respektive ofte ili postulas ankaŭ iom da landkonoj (movadaj konoj).

La sukcesa ekzamenato devas kompreni ĝenerale kaj detale tekstojn kun plej diversaj lingvaj funkcioj kaj enhavoj. Krome li/ŝi devas esti kapabla distingi inter la opinio kaj faktokomuniko, kaj li/ŝi devas ekkoni la komunikan intencon esprimitan en la vortuma maniero. Tion li/ŝi povas pruvi per kiel eble plej preciza kaj akurata hungarigo de la komprenita teksto.

Ĉe la pritaksado de la tasko laŭ la graveco de la informoĝenaj eraroj ni subtrahas inter 1-3 poentoj (respektive 4 poentojn pro la netradukitaj linioj) el la maksimume doneblaj 25 poentoj. La ĉefaj erartipoj estas difinitaj en la opaj lingvoj. Krom la konstantaj elementoj de la pritaksado pri poentumado de la specialaj problemoj de la koncerna teksto decidigas la teamkunveno de la kontrolantoj.

TASKO POR KONTROLI LA KOMPRENON DE LEGITA TEKSTO

La dua tasko por mezuri la legkapablon enhavas ĉ. 4000-4200 literospacan fremdlingvan tekston, kies komprenon pruvas la ekzamenato per respondoj al hungarlingvaj demandoj. Por tio la ekzamenato devas ĝenerale kaj detale kompreni la tekston kun plej variaj lingvaj funkcioj kaj enhavoj, krome li/ŝi devas diferencigi la opinion kaj la faktokomunikon, kaj li/ŝi devas ekkoni la komunikan intencon esprimitan per la vortuma maniero. Laŭ la solvoŝlosilo riceveblas poentoj pro ĉiuj ĝustaj informoj (el 20 poentoj).

REZULTOJ

Konvene al la rezulto de la ekzameno la ekzamenito ricevas kvalifikon *En la lingvoekzameno sukcesis* aŭ *En la lingvoekzameno ne sukcesis*. Okaze de sukceso la diplomon preparas la Lingvoekzamenojn

Akreditanta Centro NYAK – laŭ la materialo ricevita de ITK –, kaj perpoŝte sendas ĝin ITK, dum la informojn *En la lingvoekzameno ne sukcesis* – kiu same enhavas la partorezultojn de la ekzameno – preparas kaj dissendas ITK.

SUPERA NIVELO – RESUMO

Buŝa ekzameno A-tipo (entute 70 poentoj)

Tempodaŭro: ĉ. 20 minutoj

1. Parolkapablo:

Direktita parolado (kun unu el la ekzamenantoj pri ĝenerala temo), ĉ. 9-10 minutoj.

Memstara temekspliko (laŭ bilda stimulo), elektblas 1 bildo el la tiritaj 2, ĉ. 3-4 minutoj.

Situacia rolludo (preno de unu temo), ĉ. 3-4 minutoj

Fremdlingva resumo de hungara teksto (post dufoja aŭskultado de hungara teksto), ĉ. 3-4 minutoj.

Entute 70 poentoj, kiuj dividiĝas jene:

komunikiĝa valoro: 20 poentoj (4 x po 5 poentoj),

vortrezoro: 20 poentoj (4 x po 5 poentoj),

lingva ĝusteco: 20 poentoj (4 x po 5 poentoj),

prononco: 5 poentoj (entute por la 4 taskoj),

parolkompreno: 5 poentoj (entute por la 4 taskoj),

Parolkompreno (maŝinparolo): 15 poentoj.

Ĉio entute: 85 poentoj.

2. Parolkompreno: dufoja aŭskultado de originala, sed redaktita, cellingva teksto en normala parolritmo kaj solvo de hungarlingva taskfolio de demandoj pri la temo. (Tekstodaŭro: ĉ. 2,5-3 minutoj.)

Entute 15 poentoj.

Skriba ekzameno B-tipo (entute 100 poentoj)

1a parto: 30 minutoj (sen vortaro)

Respondelekta gramatika (kaj leksika) testaro (por mezuri gramatikajn kaj leksikajn konojn): 50 unuoj, 15 poentoj.

2a parto: 180 minutoj (vortaroj uzeblas)

Koncizigo de hungara teksto en la fremda lingvo (duonampleksa transigo de aŭtentika hungara gazetartikolo laŭ 5 hungaraj demandoj): ĉ. 2000-2200 literspacoj, 25 poentoj.

Direktita verkado: du temoj (letero aŭ konceptaĵo) laŭ hungarlingvaj direktivoj: ĉ. 22-25 linioj, 15 poentoj.

Hungarigo el la fremda lingvo: ĝeneraltema, aŭtentika fremdlingva teksto (plej ofte gazetartikolo): ĉ. 1600 literspacoj, 25 poentoj.

Kontroltasko pri kompreno de legata teksto:

respondo hungarlingve al hungarlingvaj demandoj pri aŭtentika fremdlingva teksto: ĉ. 4000-4200 literspacoj, 20 poentoj.

Buŝa kaj skriba (C-tipo) entute: 170 poentoj.

3-a ĉapitro

DETALE TEMARO DE LA BUŜA EKZAMENO

VIVAJ FREMDAJ LINGVOJ

BAZA GRADO

- 1. *RENKONTIĜO* (sinprezento, saluto, adiaŭo)
- 2. *FAMILIO* (personaj indikoj kaj familio de la ekzamenato)
- 3. *LOĜLOKO* (loĝadreso, mallonga prezento de la loĝejo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo)
- 4. *LABORO* (profesio, laboro kaj agadsfero)
- 5. *LERNADO* (lingvolernado, prezentado de la lernejo, lernobjektoj kaj geprofesoroj/geinstruistoj)
- 6. *VETURO PER URBAJ AMASTRAFIKILOJ* (tramo, aŭtobuso, metroo; biletaĉeto, biletvalidigo, ekveturo, alveno, itinero de veturiloj)
- 7. *VETURO PER TAKSIO* (mendo de taksio, komunikado de adreso, pago)
- 8. *VOJAĜO PER AŬTOMOBILO* (parkado, benzinaĉeto, aŭtoriparado)
- 9. *VOJAĜO PER VAGONARO, AVIADILLO, LONGDISTANCA AŬTOBUSO* (haltejo, stacidomo, ekveturo, alveno, itinero, biletvalidigo)
- 10. *VOJAĜO EKSTERLANDE* (vojaĝoficejo, pasporto- kaj dogankontrolo, monŝanĝo)
- 11. *POŜTO* (letero- kaj telegramsendo)
- 12. *TELEFONO* (informoj pri la uzado de telefono, telefonado)
- 13. *HOTELO* (mendo de tranoktado en kampadejo, privata domo, ktp, alveno, plenigo de formularo, servoj, foriro)
- 14. *RESTORACIO* (lokrezervo, mendo, pli gravaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, pago)
- 15. *GASTIGADO* (akcepto, prezentado kaj regalo de gastoj, ĝentila sinteno dum gastado)
- 16. *AĈETADO* (aĉeto en supermarkto, vendejo, nomoj de la pli gravaj nutraĵoj, vestaĵoj kaj mastrumaj artikloj)
- 17. *KINEJO, TEATRO* (programo, biletmendo, -aĉeto)
- 18. *KURACISTO* (farto, pli oftaj malsanoj)
- 19. *SPORTO* (kiu sportbranĉo lin/ŝin interesas, kiun li/ŝi praktikas)
- 20. *VETERO* (vetero en la tago, jarsezonoj)

MEZA GRADO

1. MI KAJ MIA FAMILIO

- Sinprezento,
- personaj informoj,
- prezento de la familio, geamikoj, parencoj,
- profesio de la ekzamenato kaj la familianoj, koncernaj planoj,
- priskribo de ekstera aspekto, internaj karakterizaĵoj kaj kutimoj de tria persono,
- familiaj festoj, tradicioj.

2. HEJMO KAJ LA PLEJ REKTA ĈIRKAŬAĴO

- Priskribo de la domo aŭ loĝejo,
- priskribo de la ĉirkaŭaĵo kaj medio,
- prezento de la urbo aŭ vilaĝo, resp. distrikto,
- estigo de hejmo, loĝejsituacio, ideala loĝloko,
- demandoj de la loĝejprizorgado (kostoj),

- studenthejmo, subluo, regularo, ebloj kaj malpermesoj,
- kunvivado de generacioj,
- farenadaĵoj en kaj ĉirkaŭ la domo.

3. MONDO DE LA LABORO, TAGA AKTIVADO

- Kutima taga aktivado hejme kaj en la laborejo,
- laborejo, laboro, planoj,
- elektado de profesio,
- popularaj profesioj, enspezaj ebloj,
- laborejaj kondiĉoj: avanco, rangaltiĝo, problemoj,
- akiro de laboro, senlaboreco, socialaj problemoj.

4. MONDO DE LA LERNADO

- Taga aktivado ligita al la lernado,
- informoj pri la lernejo, studobjektoj, geinstruistoj,
- lernejaj tradicioj, lernejaj travivaĵoj,
- organizita kaj memstara lernado, dumviva lernado,
- lernejtipoj, ekzamenoj, pritaksado, klasifikado.

5. KONTAKTOJ KUN ALIAJ HOMOJ, PRIVATA KAJ PUBLIKA VIVO

- Geamikoj, gekonatoj, samlernejanoj, laborejaj gekunuloj,
- vestiĝo, modo,
- kunvenoj, asocia kaj kluba vivo, korespondado, reto,
- socia vivo,
- civilaj organizaĵoj,
- publika sekuro.

6. LIBERTEMPO, AMUZIĜO, KULTURO

- Pasigo de libertempo, ebloj amuziĝi,
- persona interesiĝo, ŝatokupoj,
- teatro, kino, operoj, koncertoj,
- televido (programeroj), gazetaro, radio,
- legado: biblioteko, ŝatataj legaĵoj.

7. SANO, KONSERVADO DE SANO, SPORTO

- Korpa kaj spirita sano, sana vivmaniero,
- korpokulturo,
- malsanoj: prevento, kuracado, flegado,
- ĉe kuracisto,
- medikamentoj, kuracmetodoj,
- kuracistaj servoj, asekuro,
- fumado, alkoholo, drogoj,
- sporto: ebloj, branĉoj,
- amassporto kaj konkurssporto.

8. AĈETADO KAJ SERVOJ

- Aĉetado, precipe de nutraĵoj, vestoj kaj dommastrumaj artikloj,
- aĉetaj ebloj kaj spertoj,
- prezoj, manieroj pagi,
- diversaj vendejtipoj, aĉetaj kutimoj, donacado,

- reklamoj,
- servoj: poŝto, telefono, banko, reto, polico, diplomatia reprezentado, aŭtoriparado, frizisto, purigado, ktp,
- priskribo de servoj, spertoj.

9. VOJAĜO

- Vojaĝaj formoj: oficaj kaj turistaj vojaĝoj, privata kaj organizita vojaĝoj,
- vojaĝoj per aŭtomobilo, trajno, ŝipo kaj aviadilo, ilia uzado dum ofica vojaĝo kaj dum somerumado,
- tranoktado, kampadejo,
- servoj de vojaĝoficejoj,
- vojaĝaj travivaĵoj,
- sciindaĵoj pri eksterlandaj vojaĝoj.

10. MANĜADO

- Manĝkutimoj,
- restoracio kaj gastigejoj,
- sanaj nutraĵoj,
- preparado de kelkaj manĝaĵoj,
- hejma gastigado, invito,
- karakterizaĵoj de la hungara kuirarto.

11. TRAFIKO

- Loka trafiko kaj longdistanca vojaĝo (ebloj),
- trafikrimedoj (amastrafikiloj, aŭtomobilo, biciklo, ceteraĵoj),
- aŭtoposedo,
- stirpermeso,
- ŝancegaleco en la trafiko (maljunuloj, infanoj, handikapuloj),
- trafikreguloj, trafika moralo (aŭtistoj kaj piedirantoj, veturanto per trafikiloj, motoristoj, biciklantoj),
- trafikproblemoj, evoluigo,
- trafiksekuro.

12. KOMUNIKADO

- Rolo kaj graveco de fremdaj lingvoj,
- lingvolernaj metodoj kaj ebloj,
- rolo de la komputiloj en la ĉiutagoj,
- reto,
- avantaĝoj kaj malavantaĝoj de komputiloj,
- amaskomunikado kaj opinioformado (televido, radio, gazetaro),
- ceteraj rimedoj de kontaktoteno (reto, telefono, fakso, mobiltelefono).

13. PLI VASTA MEDIO, MONDO DE LA NATURO

- Natura medio (vegetaĵoj, bestoj),
- klimato,
- danĝeroj minacantaj la medion,
- ĉiutaga medioprotektado (pureco de la medio, selekta rubaĵkolektado, energiŝparado, recikligo),
- vetero: karakterizado de la sezonoj, aktuala vetero.

14. HUNGARIO

- Naturaj valoroj de Hungario,
- priskribo de regionoj, pejzaĝoj, urboj, turismaj vidindaĵoj,

- bazaj geografiaj kaj historiaj konoj,
- pli gravaj famaĵoj de la ĉefurbo aŭ/kaj naskourbo,
- tradiciaj kaj naciaj festoj,
- kutimoj,
- naciminoritatoj en Hungario, hungaroj en aliaj landoj,
- kulturaj valoroj,
- politikaj sciindaĵoj pri Hungario (ŝtatformo, plurpartia sistemo, parlamento, sinadministrado).

15. ESPERANTO-MOVADO KAJ EŬROPA UNIO

- Bazaj konoj pri la movado,
- aktualaĵoj,
- valoroj de la lingvo,
- ideologiaj karakterizaĵoj (neŭtraleco, kontraŭrasismo, reciproka estimo de homoj, kulturaj valoroj, ktp),
- kial indas lerni Esperanton?
- organizaĵoj de la movado: UEA, HEA,
- Pasporta Servo,
- praktika uzado de la lingvo.

SUPERA GRADO

La temaro de la supera grado grandparte identas kun tiu de la meza grado – evidente ĉi tie ni pretendas pli altnivelajn lingvajn solvojn –, kaj ĝi parte kompletiĝas per la subaj temoj. Ĉi-foje ni prezentas ekzemplodone unu el la eblaj traktadoj de la temo en kelkaj demandoj.

1. INDIVIDUO KAJ FAMILIO

1/1 Familio kaj socio. Problemoj de la institucio de familio kaj geedzeco; gefiloj, familia subvencio, ŝtata infanedukado. Ĉu frua aŭ malfrua geedziĝo, sinpreparo al geedziĝo. Divorco kaj ĝiaj sekvoj.

Ekz.: Familio/geedzeco – ĉu en krizo? Kial jes? Kial ne?

Kiel interdependas la vivnivelo kaj la infanombro?

Ĉu valoras entrepreni multe da infanoj?

Kial devas eniri multaj infanoj en ŝtatan edukinstitutojn?

Anoncoj pri geedziĝemo, partnerserĉaj institucioj – ĉu sukcesaj? Kio estas la kaŭzo?

Kiugrade eblas sendependi ene de la geedzeco?

Multaj divorcoj – kial? Kiajn sekvojn havas divorco?

Kial kverelas multaj geedzoj? Kia estas la ideala edzo/edzino?

1/2 Generaciaj diferencoj. Problemoj de la maljunuloj. Kunvivado de generacioj: ĉu helpo, ĉu konfliktofonto? Ebloj de gejunuloj por vivi memstare.

Ekz.: Ĉu la gepatroj donu konsilojn al la gejunuloj?

Ĉu subvenciu la gepatroj siajn plenkreskajn gefilojn?

Kial estas solecaj multaj maljunuloj?

Kion vi opinias pri la sistemo de pensioj?

Ĉu la ŝtato, respektive la socio adekvate zorgas pri la maljunuloj?

Kial vi (ne) irus en hejmon de maljunuloj dum via lasta vivperiodo?

1/3 Edukado en- kaj eksterlerneja. Edukprincipoj.

Ekz.: Eduki ĉu rigore aŭ permeseme?

Influo de la lernejo kaj de la familio – kiu pli forta?

Kiaj eksterlernejaj edukimpulsoj influas la gejunulojn?

Kial kaj kiel fariĝas iu junaĝa krimulo?

2. LOĜLOKO, REKTA KAJ VASTA ĈIRKAŬAĴO

2/1 *Loĝejtipoj: familia domo, privata loĝejo, luloĝejo. Diferencoj, avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Loĝejmanko, -konstruado, prezoj de nemoveblaĵoj.*

Ekz.: Ĉu ekzistas manko de loĝejoj? Kaŭzoj?

Subluado – kiugrade kontentiga solvo?

Loĝejkonstruado – kiaj ŝanĝoj?

2/2 *Moderna loĝejo, ideala hejmo. Loĝejpretendoj ekster- kaj enlande. Problemoj en blokdomoj (soleciĝo, subeniĝo).*

Ekz.: Normala vivo – kiuamplaksa loĝejo?

Kie estu konstruataj novaj loĝejoj?

Ĉu malkonstrui la malnovajn urbopartojn?

2/3 *Problemaro de la rekta ĉirkaŭaĵo. Komunalaj servoj en via loĝloko. Porsetlementa agado de la memdirektado. Mediopolucio kaj ĉiutaga medioprotektado en la loko, kie vi loĝas (aranĝo de rubaĵoj kaj venenaj materialoj; polucio, resp. protektado de aero, akvoj, grundo).*

Ekz.: Kiel aranĝas memdirektado la zorgojn de la loĝloko?

Kiaj evoluigoj estas okazantaj (vojreto, publika provizado, sanitara kaj maljunaĝa prizorgo, kulturaj instancoj, ktp.)?

Kiajn mediopoluciojn vi trafas en via loĝloko? Kiajn aranĝojn planas la memregado por nuligi ilin?

Kiajn civilajn iniciatojn vi konas, resp. konsideras necesa por protekti la medion?

2/4 *Problemaro de la vasta ĉirkaŭaĵo: mondskalaj mediaj problemoj (trokresko de la homaro, malsato en la tria mondo, tendencoj minacantaj la naturmedion: klimatoŝanĝo, ozontruo, ceteraj).*

Ekz.: Ĉu vi konsideras taŭga tion, kiel la internaciaj organizaĵoj aranĝas la ĉi-suprajn problemojn?

Kiu devus pli aktive ekagi?

Kiel eblus haltigi la supre menciitajn procezojn minacantajn la homan vivon?

3. MONDO DE LABORO KAJ INSTRUADO

3/1 *Elektado de profesio, sinpreparo por la plustudado; egaleco de ŝancoj; modifo de profesio.*

Ekz.: Pri kiuj sciencbranĉoj interesiĝas la plustudentoj, kaj pri kiuj ne? Kio kaŭzas tion?

Kiuj estas la kondiĉoj de la sukcesa priakcepta ekzameno?

Universitatoj kaj altlernejoj, kie la gestudentoj pagas – kiucele?

Kial modifas nuntempe multaj gejunuloj sian profesion?

Eksterlandaj studvojaĝoj kaj stipendioj – kiaj ebloj?

Ĉu vi konas decidojn pri ŝancegaleco? Ĉu entute ekzistas ŝancegaleco?

3/2 *Fakaj sukcesoj, kariero. Socia prestiĝo de la opaj metioj. Honoro de la spirita kaj fizika laboroj. Plukapabliĝo kaj rekapabliĝo. Senlaboreco. Laborantaj virinoj, gvidantinoj.*

Ekz.: Ĉu vi konsideras justa la etikan kaj financon honoron de la opaj metioj?

Kiuj fakterenoj estas en ekstreme malavantaĝa situacio, kiajn sekvojn tio havas?

Kial entreprenas multaj porokazajn komisionojn post la taga, 8-hora laboro?

Kiu povas fari karieron en la nuntempa Hungario?

Kian influon havas la senlaboreco al la entreprena laboro kaj al la labordisciplino?

Per kiaj aranĝoj eblus malpliigi la nombron de la senlaboruloj? Kio ŝanĝiĝis post la aliĝo al EU?

Ĉu la societo konvene prizorgas la senhejmulojn?

3/3 *Etentreprenoj kaj multnaciaj entreprenoj en Hungario. Impostado, prezoj kaj salajroj. Griza kaj nigra ekonomio.*

Ekz.: La ĉeesto de multnaciaj entreprenoj en la hungara ekonomio – kiaj avantaĝoj, kiaj malavantaĝoj?

Ĉu estas ĝuste, ke la ŝtato subtenas per diversaj favoraĵoj la eksterlandajn investojn?

Kial (ne) estas justa la impostadsistemo?
Kiu(j) meritas pli grandajn impostfaciligojn?
Kiel eblus imposti la nevideblajn enspezojn?

4. MANGĜADO

4/1 *Sana kaj malsana nutrado; sekvoj de la malĝusta nutrado; malbonaj dentoj, tronutriteco kaj maldikiga terapio, prezoj kaj sanaj menuoj. La hungara kuirarto kompare al tiu de aliaj landoj; sinteno dum manĝado, kutimoj pri manĝado kaj trinkado en Hungario kaj eksterlande. Trinkaj konsumado, alkoholismo, kaŭzoj kaj sekvoj de alkoholismo.*

Ekz.: Kial estas malfacile ŝanĝi la nutradkutimojn?
La maldikiga terapio kial estas ofte malsukcesa?
Ĉu vi konsentus pri la kompleta malpermeso de alkoholtrinkado?
Kial estas popularaj la kuirlibroj?
Kiel vi opinias pri vegetaraneco?

4/2 *Restoracioj tradiciaj kaj memservaj en- kaj eksterlande.*

Ekz.: Kiajn gastigejojn vi proponus al viaj eksterlandaj geamikoj?
Kiaj ebloj manĝi estas surstrate?
Kial vi (ne) ŝatas ilin?

5. SERVOJ, KOMERCO

5/1 *Foirplaco, varprovizo, sortimento, kvalito. Aĉetocentroj kaj tradicia komerco. Merkato. Anoncoj, reklamoj. Nigra komerco.*

Ekz.: Kial (ne) prezentas pli altnivelan komercon la hipermarketoj kaj aĉetocentroj?
Ĉu la merkato favore influas la ekvilibron de prezoj kaj ofertoj?
Kial ĉesas multaj etvendejoj, kiajn sekvojn tio kaŭzas?
Ĉu valoras aĉeti eksterlande?

5/2 *Moncirkulado, bankoj, asekurkompanioj; kreditoj, investoj, valutoaĉetado.*

Ekz.: Kial ne valoras ŝanĝi monon en la subtrairejo?
Kiajn bankkreditojn vi konas (por domkonstruado, varaĉeto, ktp.), kun kiaj kondiĉoj?

5/3 *Modpretendoj kaj komerco. Direktoj de modindustrio, modo kaj prezoj, modo en la vestiĝo kaj sur aliaj kampoj.*

Ekz.: Kial (ne) estas bone sekvi la modon?
Kiu(j) faktoroj influas la modon?
Kion vi opinias pri la nuntempa modo?

6. SANITARAJ AFEROJ, SPORTO, VETERO

6/1 *Sanprotekto, kondiĉoj de la sana vivstilo kaj ĝiaj ebloj en nia lando. Malsaniĝo, vizito ĉe kuracisto.*

Ekz.: Kia estas la bona kuracisto?
Kia estas la bona kontakto inter malsanulo kaj kuracisto?
Kiu(j)grade influas la sociala stato la sanon kaj vivstilon de la individuo?
Ĉu la kuracisto devas deklari veran diagnozon?

6/2 *Socia asekuro, sanitariaj aferoj. Malpliigo de la popolnombro, familia (porinfana) subvencio, pensiosistemo.*

Ekz.: Kiajn bazajn problemojn alfrontas malsanulo en la hungara sanitara sistemo?
Ĉu eblas influi la popolmalpliigon?

6/3 *Medicinaj sciencoj, civilizaciaj malsanoj kaj iliaj disvastiĝo, danĝeroj; transplantado de organoj. Naturkuracado. Medikamentkonsumado, -prezroj.*

Ekz.: Kiel eblas eviti ĉarlatanojn en la naturkuracado?

Kiaj novaj malsanoj aperis?

Kiuj el ili estas ligeblaj al la danĝeraj mediaj influoj?

Kiajn medicinajn kaj etikajn problemojn starigas la transplantado de organoj?

6/4 *Fumado, drinkado, disvastiĝo de drogoj. Problemaro de infektaj malsanoj, kaŭzoj, kuracado, preventado.*

Ekz.: Kiu estas socie pli danĝera: ĉu la alkoholismo aŭ la drogkonsumado?

Kion povas fari la gepatroj, la lernejo kaj la socio kontraŭ la drogkonsumado de la gejunuloj?

Por kio elspezu la ŝtato pli multe, ĉu por la preventado aŭ por la rehabilitado?

6/5 *La rolo de sporto en la sankonservado kaj en la edukado. Situacio de sporto kaj sportistoj en Hungario kaj en aliaj landoj. Sporto en la vivo de individuo, ebloj sporti.*

Ekz.: Kial profesiismo regresigas amatoran sporton?

Kiuj sportbranĉoj estas popularaj ĉe ni?

Kiajn novajn sportbranĉojn vi konas, kaj kiuj ili estas?

7. TRAFIKO

7/1 *Trafikmoralo, neregulaĵoj, ĝentileco kaj senpacienco. Diferencoj inter la en- kaj eksterlandaj cirkonstancoj.*

Ekz.: Kiajn trafikregulojn plej ofte malobeas la hungaraj ŝoforoj?

Ĉu vi konsideras konvena la mezuron de la punoj?

Kiajn ŝanĝojn vi proponus en la intereso de pli efika trafikregulado?

7/2 *Akcidento, prevento de akcidentoj, kaŭzoj, ebria stirado. Stirpermeso, akiro de stirpermeso. Zorgoj de aŭtoposedantoj: deponado, elekto de aŭtomobilo, parkado. Tipoj de aŭtomobiloj. Aŭtomobilŝteloj. Flegado. Difektiĝoj, paneoj, muntejoj.*

Ekz.: Kion fari, se ni ĉeestas trafikakcidenton?

Kial estas danĝeraj la malnovaj aŭtomobiloj?

Per kia rapideco estas konvene trafiki sur ŝoseo?

Kiuj estas la plej fidindaj aŭtomobiltipoj?

7/3 *Evoluo kaj evoluigo de trafiko. Trafikzorgoj de Budapeŝto, resp. de via loĝloko. Amastrafiko en la grandurboj. Konstruado de metroo, planoj de pontoj kaj ŝoseoj.*

Ekz.: Kian influon havas konstruo de ŝoseo al la evoluo de koncerna regiono?

La konstruadon de kiu ŝoseo vi konsideras la plej urĝega?

Kiel reagas aŭtomobilistoj, se plikostiĝas matricoj?

Kiel taŭgas la opaj veturiloj en la amastrafiko?

7/4 *Trafiko kaj medioprotektado. Vojreto kaj fervojreto, ĉu kamionoj aŭ fervojo? Stato de la hungaraj fervojoj. Trafiko en aliaj landoj, precipe en EU. Taŭgaj rimedoj de vartransportado. Problemoj de dogano kaj limtrapaso. Savo de medio kaj vidpunktoj de energiŝparado en la evoluigo de trafiko: EU-planoj.*

Ekz.: Kiaj estas la nevenkeblaj baroj de la aŭtomobiltrafiko?

Kiajn solvojn proponas la opaj interesgrupoj?

8. AMUZO, KULTURO, KOMUNIKADO

8/1 *Amaskomunikaj rimedoj kaj tradiciaj kulturaj, amuzaj formoj. Televido kaj kino; televido kaj legado; televido kaj malsana vivstilo; televido kaj matĉo; televido kaj aŭdvid-aparato, televido kaj radio.*

Programsortimento de la opaj kanaloj, ebloj de programkaptado. Komputilaj ludoj, Interreto, teatra vivo en Hungario kaj en aliaj landoj.

Ekz.: Kial malhavas publikon la hungaraj filmoj?

Kio estas la diferenco inter teatra prezentado kaj ties televida dissendo?

Kio estas via opinio pri la moderna teatra reĝisorado?

Kian influon havas la merkato al la kultura vivo?

Kiajn ekzemplojn kaj kontraŭekzemplojn vi konas pri tio, ke ankaŭ kulturo estas varo?

Kion vi opinias pri la televidaj reklamoj?

8/2 Popolklerigaj ebloj, kultura vivo en urboj kaj en vilaĝoj. Taskoj kaj zorgoj de kulturdomoj kaj vilaĝdomoj. Muzeoj kaj publika klerigado. Muziko: cigana muziko, popolmuziko, klasika kaj leĝera muzikoj, muzikinstruado. Instruado de plenkreskuloj, moderna kulturiteco. Belartoj, arta edukado. Rolo de gazetaro.

Ekz.: Kial (ne) povas plenumi la kulturdomoj siajn celojn?

Kio apartenas al la nocio de ĝenerala kulturiteco?

Kiel eblus atingi, ke la publiko subtenu la valoran arton kaj ne la malvaloran?

Kiom da homoj vizitas kinejojn?

Kion pensas eksterlandanoj pri la cigana muziko?

8/3 Kontaktoteno nuntempe: telefono, poŝtelefono. Korespondado kaj retkorespondado (elektra letero). Societaj kunvenoj en la opaj aĝgrupoj: civilaj organizaĵoj, sportaj asocioj, junularaj organizaĵoj, kluboj.

Ekz.: Por kiuj celoj konvenas kaj por kiuj ne la poŝtelefono?

Ĉu plene forigos korespondadon la retkorespondado (elektra letero)?

Ĉu konvene anstataŭigas televido kaj monda reto la societajn kunvenojn?

Kiajn civilajn organizojn vi konas, al kiuj vi volonte membriĝus?

Ĉu vi estas membro de iu Esperanta organizaĵo?

9. VOJAĜO AL EKSTERLANDO

9/1 Spertoj kaj travivaĵoj de eksterlandaj vojaĝoj.

Ekz.: En kiu via eksterlanda vojaĝo vi akiris travivaĵojn, spertojn, el kiuj vi havas gravan instruon?

Memoro de kiu urbo, resp. vidindaĵo restis por vi la plej daŭra, kaj kial?

Laŭ viaj vojaĝaj spertoj kion scias eksterlandanoj kaj eksterlandaj esperantistoj pri ni kaj pri nia lando?

9/2 Konatiĝo kun iu fremda lando kaj kulturo. Malsamaj tradicioj kaj kutimoj. Karakterizaĵoj de certa regiono, urboj. Spertoj pri la homaj kontaktoj, pri etoso, politika establiĝo, sociaj grupoj, ekonomia stato, laboretiko, ktp.

Ekz.: Kiajn spertojn vi gajnis en la koncerna lando pri laborejoj, lernejoj?

Kiajn spertojn vi havas pri la eksterlanda Esperanto-movado?

Ĉu la esperantistoj estas pli amikaj ol la aliaj homoj?

Kiel helpis vian vojaĝon la esperantistoj?

Rimarko: Evidente ne ĉiu ekzamenato estis jam eksterlande. Tamen ĉiu havas iujn spertojn el libroj, filmoj, amikaj rakontoj, korespondado.

10. HUNGARIO

10/1 Socia establiĝo de Hungario: balota sistemo, partioj, potencbranĉoj. Ekonomiaj kontaktoj, eksportkapablo. Niaj kontaktoj kaj rolo en Orient-Meza Eŭropo. Ekonomia evoluo. Geografia situo kaj ekonomio: trafiko, inundoj, ktp.

Ekz.: Kiuj estas la plej gravaj, plej efikaj produktobranĉoj?

Hungaraj agrikulturaj produktaĵoj – ĉu problemoj por EU?

Hungaraj laboremuoj – ĉu zorgoj por Eŭropo?

10/2 Deveno kaj evoluo de la hungara lingvo; problemoj de la lingvouzo, kaŭzoj de maldeca, resp. de malriĉeca parolo.

Ekz.: Al kiuj lingvoj similas la hungara lingvo, kaj kiugrade?

Kie estas parolataj la parencaj lingvoj?

Kial ne estas sufiĉe bona la efiko de la lerneja lingvoinstruado?

10/3 Ĉefaj eventoj kaj rolantoj de la hungara historio. Ampleksa hungara naciminoritato en la najbaraj landoj: duobla identeco, ligiĝo al la hungara kulturo. Rajtoj kaj situacio de la naciminoritatoj en Hungario. La plej granda naciminoritato: la romaoj (ciganoj). Kultura vivo en nia lando. Esperanta movado. Hungara kulturo en la okuloj de eksterlandanoj; ŝablonoj: gulaŝo, ĉardo, pusto, cigana muziko, ktp. Krimoj, publika sekuro.

Ekz.: Kiajn renovigojn alportis la muziko de Bartók kaj Kodály?

Kion vi scias pri Kossuth Lajos, Petőfi Sándor, Széchenyi István, ktp?

Kial iris multaj hungaraj sciencistoj al eksterlando?

Kion vi scias pri Hungaria Esperanto-Asocio?

Rim.: La kulturaj kaj informaj pretendoj bezonataj por la temo ne superas la nivelon, kiun certigas la mezlernejaj konoj kaj iom da gazetlegado. Nia ekzameno cetere deziras mezuri ne la ĝeneralan kulturitecon, sed ni devas priatenti, ke la eksterlandanoj vizitante nin povas starigi amason da tiaj demandoj, kiuj rilatas al Hungario, kaj la ekzamenitoj devas respondi al ili.

4-a ĉapitro

MEZURA SISTEMO DE ITK-EKZAMENOJ

ĜENERALA PRISKRIBO DE LA FREMDLINGVA PLENUMAĴO PRETENDATA SUR LA OPAJ NIVELOJ

BAZA GRADO

ĜENERALA PRISKRIBO

Limigita lingvouzo, kiu konvenas por ke la lingvouzanto sukcese rolu en la plej gravaj viv- kaj en konataj parolsituacioj. La daŭran komunikadon malhelpas la oftaj eraroj en la parolĝusteco kaj vortuzo, tiel li/ŝi povas realigi sian komunikan celon de tempo al tempo nur per gravaj fortostreĉoj.

PAROLKAPABLO

En meze komplika parolo li/ŝi sukcesas kun bezonata lingva sekureco. Li/ŝi ofte alĝustigas sin (respektive bezonas alĝustigon). Li/ŝi malcertas en la esprimo de la lingvaj stiloj. Li/ŝi rolas ĝuste en direktita parolo, sed en la libera lingva manifestiĝo li/ŝi trafas fortajn barojn. La uzata lingvo estas tre limigita. La gepatralingva prononco forte sentblas. Li/ŝi ne povas komuniki per normala rapideco.

PAROLKOMPRENO

En simplaj parolsituacioj li/ŝi bone komprenas la esencon de la komunikaĵo de la parolanto, kiu parolas klare kun ĝusta prononco kaj malpli rapide ol kutime. Ĉe preciza kompreno de la parolintenco de ĝeneralnivelaĵaj parolantoj li/ŝi havas jam problemojn. La kompreno de la detaloj kaj lingvaj nuancoj estas kutime nesukcesa. Li/ŝi ofte redemandas aŭ petas precizigon.

LEGKAPABLO

Lia/ŝia lingvokono ebligas certan komprenon nur de simplaj tekstoj. Li/ŝi komprenas la esencon de pli simpla komunikaĵo, sed ĉe la detaloj kaj lingvaj fajnaĵoj li/ŝi havas jam problemojn. Li/ŝi ofte konsultas la vortaron. Lia/ŝia legrapideco tial estas malrapida, ĉar li/ŝi devas relegi certajn partojn aŭ bezonas uzi vortaron. Simplajn tekstojn li/ŝi povas legi kun kutima rapideco.

SKRIBKAPABLO

Lia/ŝia lingvokono ebligas sekure skribi nur simplajn tekstojn, ĉe kutimagrade komplikaj tekstoj li/ŝi havas jam problemojn. Li/ŝi kapablas vortumi la esencon de sia direndaĵo, sed li/ŝi ne kapablas sentigi la lingvajn fajnaĵojn. La tekstoaranĝo estas hazarda. Li/ŝi havas seriozajn problemojn ĉe lingva sentigo de interligoj (manko de kohezio kaj kohereco). Li/ŝi malhavas la konvenajn lingvajn rimedojn por esprimi la konvenan stilon. La transdonon de precizaj informoj ĝenas la ortografiaj malĝustaĵoj.

TRANSIGA KAPABLO

Li/ŝi kapablas – laŭ la priskribo de simplaj hungarlingvaj situacioj – transigi siajn pensojn en grave simpligita formo, interaktive al la cellingvo. Li/ŝi kapablas hungare, skribe resumi la esencon kaj certajn detalojn de cellingva teksto, se ĝi estas pli facila ol kutime.

MEZA GRADO

ĜENERALA PRISKRIBO

La ekzamenato kapablas memstare kaj efike apliki la lingvon en konataj kaj (nur) en pli facilaj situacioj. La lingva ĝusteco, la vortuzo, la kongrueco (flueco) de la parolo kaj la aranĝo de la pensoj estas ankoraŭ ofte malpreciza, tamen li/ŝi jam sukcese komunikas kaj komprenas la esencon.

PAROLKAPABLO

En ĝeneralaj parolsituacioj li/ŝi kapablas transdoni la esencon de la komunikaĵo, ĉe la precizigo, esprimo de la detaloj li/ŝi havas kelkfoje zorgojn, kaj li/ŝi ne sukcesas en pli komplikaj kaj pretendemaj parolsituacioj. Liaj/ŝiaj esprimoj kelkfoje bezonas alĝustigojn aŭ revortumojn. Li/ŝi konas la pli gravajn stilajn diferencojn, sed li/ŝi restas nesentema pri la nuancoj. Pro la limigita lingvoscio li/ŝi kapablas daŭre paroli nur foj-foje. Estas sentebla kaj evidenta la fremdeca prononcmalmaniero.

PAROLKOMPRENO

La meze malfacilan kaj mezrapidan parolon li/ŝi komprenas sufiĉe bone kun tuja kapto de la esenco, sed pri la detaloj li/ŝi kelkfoje redemandas. Li/ŝi havas la rutinon, ke la ne preciza kompreno de malpli gravaj elementoj lin/ŝin ne ĝenas en la ĝenerala kompreno.

LEGKAPABLO

Sekure li/ŝi legas meze malfacilajn tekstojn, sed ĉe la kompreno de pli malfacilaj tekstoj li/ŝi havas jam problemojn. La esencon de la direndaĵo li/ŝi komprenas, sed el la interpretado evidentiĝas, ke ĉe la ĝusta kompreno de la detaloj kaj nuancoj ekzistas problemoj. Li/ŝi havas malfacilaĵojn en la daŭra legado kaj en la stilrekono de la teksto. Kelkfoje li/ŝi bezonas uzi vortaron, sed la tekstojn de kutima malfacileco li/ŝi povas legi kun akceptebla rapideco.

SKRIBKAPABLO

Sekure li/ŝi skribas tekstojn de meza malfacileco. La direndaĵon (sur tiu ĉi nivelo) li/ŝi esprimas adekvate kaj klare. La pli efikan disvolvon de la direndaĵo baras la limigita lingvokono. La tekstoaranĝo estas konvena al postuloj, sed problemoj troviĝas ĉe la glateco kaj kohereco. Li/ŝi povas sentigi nur la plej

bazajn stildiferencojn. La lingva repertuaro estas sufiĉe varia, sed en la lingva ĝusteco kaj vortuzo troviĝas pluraj misuzoj.

TRANSIGA KAPABLO

Li/ŝi kapablas – laŭ la priskribo de meze malfacilaj hungarlingvaj situacioj – transigi fremdlingve siajn pensojn en simpligita formo interaktive. Li/ŝi kapablas kun akceptebla precizeco (sen preciza reproduktado de la stilo) hungarigi mezfacilajn cellingvajn tekstojn per vortaro. Sen grava damaĝo de la informaĵo li/ŝi kapablas konsultante vortaron traduki en la cellingvon hungaran tekston, bazitan sur la lingva kontrastiveco kaj pli facilan ol kutime.

SUPERA GRADO

ĜENERALA PRISKRIBO

La lingvouzo de la ekzamenato estas sukcesa en la plej multaj parolsituacioj krom la tre komplikaj kaj malfacilaj lingvaj situacioj. Kelkaj eraroj ankoraŭ troviĝas en la lingva ĝusteco, kongruenco kaj lingvouzo, sed la komunikado estas sukcesa kaj konsekvenca, en la esprimkapablo kaj pritakso de situacio nur malofte ekzistas iom da malcerteco.

PAROLKAPABLO

Li/ŝi rutine kaj sekure moviĝas en tre vasta skalo de parolsituacioj. Nur malofte okazas, ke li/ŝi ne povas sin precize esprimi aŭ la direndaĵo bezonas alĝustigon. Li/ŝi estas egalranga partnero en la kutimritma parolsituacio, nur malofte okazas rompoj en la kontinua parolo. La lingva ĝusteco plejparte estas senerara, la vortuzo estas postulema. Li/ŝi havas fremdecan prononcmanneron, sed ĝi neniel ĝenas la komunikadon.

PAROLKOMPRENO

Sen apartaj malfacilaĵoj li/ŝi komprenas la esencon kaj detalojn de diversritmaj, -temaj kaj -stilaj direndaĵoj de kulturitaj parolantoj. Por alĝustigo nur tre malofte li/ŝi redemandas. La eventualajn miskomprenojn kaj misaŭdojn kaŭzas ne fonetikaj kialoj, sed precipe leksikaj, stilaj kaj foninformaj mankoj (nekomprene de gepatralingva humuro, sarkasmo, fajna ironio, ktp).

LEGKAPABLO

Li/ŝi kapablas kun kutima rapideco legi kaj kompreni tekstojn de diversaj malfacileco, temo kaj stilo. Li/ŝi komprenas precize la detalojn, tamen en la kompreno de la fajnaĵoj kelkfoje ekestas problemoj. La stilnuancojn li/ŝi rekonas, kaj li/ŝi kapablas ilin (krom kelkaj fajnaj stilnuancoj) rekonstrui en la gepatra lingvo. Dum la legado de teksto li/ŝi bezonas uzi vortaron nur malofte.

SKRIBKAPABLO

Li/ŝi kapablas parole vortumi kaj skribe esprimi pensojn de diversaj malfacileco, temo kaj stilo. Li/ŝi kapablas komuniki sian parolintencon klare kaj unusence. La tekstaraĝo estas konvena, la vortuzo estas elektema, kaj la stilo estas glata. Okazas nur maloftaj eraroj en la lingva ĝusteco, leksiko, stilistiko kaj ortografio. Lia/ŝia vortumo plejparte proksimiĝas al la gepatralingva nivelo.

TRANSIGA KAPABLO

Li/ŝi kapablas – laŭ priskribo de hungarlingva situacio kun pretendema leksiko – kun fremdlingva pretendemo interaktive, parole transigi siajn pensojn pri pli abstraktaj temoj de ĝenerala kulturiteco, respektive pri aktualaĵoj de la hungaraj realaĵoj, sociaj institutoj kaj kutimoj. Li/ŝi kapablas en fremda lingvo parole resumi aŭditan, mezgrade malfacilan, hungaran tekston.

Li/ŝi kapablas kompreni cellingvan tekston, pli komplikan ol kutime, kaj ĝin traduki per vortaro en la hungaran kun malpli gravaj stilistikaj malĝustaĵoj. Li/ŝi kapablas legitan, meze komplikan tekston resumi skribe en la cellingvo. Li/ŝi kapablas gepatralingve esprimi kaj kompreni lingvajn, leksikajn kaj semantikajn diferencojn de diversaj kulturoj.

DETAJAJ MEZURAJ VIDPUNKTOJ DE LA BUŜA EKZAMENO

BAZA GRADO

KOMUNIKIĜA VALORO

0 poento

Li/ŝi tute ne aŭ nur malkontinue komunikas en la fremda lingvo.

1 poento

Dum la ekzameno la ekzamenito kapablas – krom kelkaj esceptoj – komuniki nek memstare, nek respondante al demandoj.

2 poentoj

En la plej bazaj temoj la ekzamenito komunikas nur per malriĉa vortrezoro kaj malĝusta frazkonstruado.

3 poentoj

Li/ŝi parolas kontinue, sed la aplikata vortrezoro kaj parolturnoj iusence montras la influon de la gepatra lingvo (hungareca pensmaniero).

4 poentoj

La ekzamenato parolas kontinue kaj kompreneble, aplikante cellingvajn parolturnojn – kun maloftaj eraroj.

5 poentoj

Li/ŝi bone aplikas la parolturnojn baze necesajn en la ĉiutagaj parolsituacioj.

VORTTREZORO

0 poento

La vortrezoro de la ekzamenato ligiĝas nur al kelkaj leksikaj unuoj.

1 poento

Li/ŝi eĉ pasive konas nur la plej bazan vortrezoron de la nivelo.

2 poentoj

Li/ŝi aplikas la vortrezoron postuleblan sur tiu ĉi nivelo kun multaj malĝustaĵoj ĝenantaj la parolon.

3 poentoj

Li/ŝi uzas la aktivan vortrezoron kun malfirmaĵoj, la pasiva vortrezoro estas kontentiga.

4 poentoj

Spite al pli malgrandaj necertaĵoj li/ŝi pruvas sian konon de aktiva kaj pasiva vortrezoro konvena sur tiu ĉi nivelo.

5 poentoj

Li/ŝi aplikas sian vorttrezoron varie kaj konvene. La respondoj al la demandoj de ekzamenanto sendube montras la konon ankaŭ de la konvena pasiva vorttrezoro.

LINGVA ĜUSTECO

0-1 poento

El la vidpunkto de lingva ĝusteco li/ŝi havas eĉ ne unusolan pritakseblan frazon. La malĝustaĵoj estas tiom gravaj, ke praktike tute ne aŭ apenaŭ ekestas komunikado.

2-3 poentoj

La gramatikaj strukturoj estas tre simplaj, ofte malprecizaj, kaj ili ofte misgvidas la parolkunulon.

4-5 poentoj

Li/ŝi povas realigi sian parolintencon nur per la apliko de simplaj, kelkfoje malprecizaj gramatikaj strukturoj (prezenco anstataŭ preterito, singularo anstataŭ pluralo, ktp).

6-7 poentoj

Li/ŝi komunikas kontinue aplikante gramatikajn strukturojn de la nivelo, la malĝustaĵoj aperas ne konsekvence, li/ŝi kelkfoje alĝustigas sin.

8-9 poentoj

El la vidpunkto de lingva ĝusteco la frazoj montras malmultajn erarojn. Li/ŝi komprenas pasive ankaŭ pli komplikajn strukturojn (ekz. pasiva voĉo).

10 poentoj

En la komunikado li/ŝi aplikas same sukcese kaj simplajn, kaj komplikajn gramatikajn strukturojn.

PRONONCO

0 poento

La malĝusta intonacio kaj malĝusta akcento de la vortoj, respektive la prononco faras la parolon de la ekzamenito nekomprenebla.

1 poento

Pro la oftaj torditaj voĉoj kaj malbone aplikata intonacio apenaŭ estas komprenebla la parolo.

2 poentoj

La malbone prononcitaj vortoj kaj la malĝusta intonacio ĝenas la komprenon.

3 poentoj

La prononco de la ekzamenato – krom kelkaj fonemoj kaj vortoj – ĝenerale estas akceptebla, ĝi ne kaŭzas miskomprenon.

4. poentoj

La direndaĵo de la ekzamenato estas facile komprenebla ankaŭ por cellingva aŭskultanto, spite al kelkaj malĝustaĵoj.

5 poento

La akcentado de la frazoj, la prononco de la vortoj estas proksima al la fremdlingva normo.

PAROLKOMPRENO

0-2 poentoj

La fremdlingvan, normalritman parolanton la ekzamenato eĉ en la plej bazaj temoj ne komprenas, tiel interparolo ne aŭ apenaŭ ekestas.

3-5 poentoj

La informaĵojn li/ŝi ofte ne komprenas aŭ miskomprenas, tiel la komunikado ofte blokiĝas, respektive la informfluo rompiĝas.

6-8 poentoj

Li/ŝi komprenas nur la esencon de la informo, li/ŝi ofte redemandas (sed evidente ne pro akustikaj kaŭzoj).

9-11 poentoj

La ekzamenato foj-foje redemandas, sed la vortrezoron kaj gramatikajn strukturojn de la nivelo li/ŝi komprenas, tial la komunikado konsidereblas seninterrompa.

12-14 poentoj

Li/ŝi bone komprenas la ĉiutagajn, normalritmajn komunikaĵojn kaj malfacilas nur malofte.

15 poentoj

La informojn en la bazaj temoj li/ŝi kapablas kompreni precize kaj facile. La komunikado estas glata.

MEZA GRADO

KOMUNIKIĜA VALORO

0 poento

Li/ŝi ne kapablas komuniki siajn pensojn en la fremda lingvo, al la ekzamenanto venas nur rompitaĵoj, nekoheraj, apenaŭ rekoneblaj parolĉifonoj.

1 poento

Li/ŝi komunikas nur interrompitaĵojn, nekompreneble eĉ en la bazaj temoj kaj en ĉiutagaj parolsituacioj.

2 poentoj

Li/ŝi komunikas nur en la plej bazaj temoj kun parta realigo de sia parolintenco.

3 poentoj

Pri ĉiuj temoj dum la ekzameno li/ŝi kapablas fremdlingve esprimi sian direndaĵon, la parolturnoj (leksikaj, gramatikaj) ofte estas malĝustaj. La informaĵoj respegulas la direndaĵon.

4 poentoj

La ekzamenato kontinue, kompreneble konversacias, kvankam foj-foje li/ŝi faras komprenĝenajn erarojn.

5 poentoj

En ĉiuj temoj de la buŝa ekzameno li/ŝi kapablas komuniki memstare, kontinue kaj kompreneble.

VORTTREZORO

0 poento

Eĉ la plej bazan vortrezoron li/ŝi ne konas, ĉiuj manifestiĝoj estas malĝustaj.

1 poento

Li/ŝi aplikas aktive nur parton de la plej baza vortrezoro, kaj li/ŝi ofte faras komprenĝenajn malĝustaĵojn.

2 poentoj

Okazas multaj eraroj en la aktive uzata vortrezoro, la pasiva vortrezoro estas tre mankohava.

3 poentoj

Kvankam kun malĝustaĵoj, tamen aktive li/ŝi uzas la pretendeblan vortrezoron, li/ŝi multe komprenas ankaŭ pasive.

4 poentoj

La ekzamenato kapablas apliki parolturnojn, kaj spite al malpli gravaj malcertaĵoj eblas bone komuniki kun li/ŝi.

5 poentoj

Li/ŝi aplikas la aktivan kaj pasivan vortrezoron konvene kaj kvante, kaj kvalite.

LINGVA ĜUSTECO

0 poento

Pro la gravaj gramatikaj malĝustaĵoj li/ŝi ne kapablas esprimi sian direndaĵon.

1 poento

Li/ŝi uzas nur simplajn gramatikajn strukturojn, kaj li/ŝi esprimas sian direndaĵon en malĝusta formo.

2 poentoj

Dum la ekspliko de la direndaĵo li/ŝi uzas ankaŭ pli komplikajn gramatikajn strukturojn, sed ofte okazas gravaj eraroj.

3 poentoj

Li/ŝi malĝuste aplikas la simplajn kaj pli komplikajn gramatikajn strukturojn de la nivelo.

4 poentoj

Li/ŝi faras nur malpli gravajn erarojn en la uzado de variaj gramatikaj strukturoj.

5 poentoj

Li/ŝi preskaŭ senerare uzas ankaŭ la pretendebajn, pli gravajn gramatikajn strukturojn.

PRONONCO

0 poento

Lia/ŝia prononco estas malĝusta tiugrade, ke la partnero tute ne aŭ apenaŭ komprenas la pensojn de la ekzamenato.

1 poento

La prononco de la plimulto de la vortoj, la akcento kaj ankaŭ la intonacio estas malĝusta, la parolo apenaŭ kompreneblas.

2 poentoj

Li/ŝi konsekvence faras samtipajn, prononcajn malĝustaĵojn.

3 poentoj

Lia/ŝia prononco pli-malpli kongruas kun la normoj, sed troviĝas malĝustaĵoj. La intonacio estas akceptebla.

4 poentoj

En la prononco kaj akcento estas nur malpli gravaj eraroj, sed ili ne kaŭzas miskomprenon.

5 poentoj

La prononco el ĉiuj vidpunktoj estas proksime al la pretendata nivelo, aŭ atingas ĝin.

PAROLKOMPRENO

0 poento

La fremdlingvan, normalritman parolon la ekzamenato eĉ en la plej bazaj temoj ne komprenas, sekve ne povas ekesti komunikado.

1 poento

Li/ŝi ne komprenas la komunikaĵojn aŭ miskomprenas ilin, tial la informfluo ofte ĉesas.

2 poentoj

Li/ŝi komprenas nur la informojn ligitajn al ĉiutagaj parolsituacioj.

3 poentoj

Li/ŝi bone komprenas parton de la komunikaĵo, sed li/ŝi redemandas ofte vekante impreson de necerteco.

4 poentoj

La ekzamenato komprenas la normalritmajn informojn – krom kelkaj esceptoj – ankaŭ en pli pretendemaj temoj de la nivelo.

5 poentoj

La ekzamenato eminente komprenas la informaĵojn en pli pretendemaj temoj, la komunikado estas glata.

SUPERA GRADO

KOMUNIKIĜA VALORO

0 poento

Li/ŝi ne eksplikas siajn pensojn en la fremda lingvo, li/ŝi parolas interrompите aŭ nekompreneble.

1 poento

Li/ŝi povas esprimi siajn informojn nur per tre simplaj frazoj. La manko de lingvaj rimedoj estas evidenta.

2 poentoj

En neniuj taskoj li/ŝi kapablas kontinue, memstare ekspliki sian opinion, sed foj-foje aŭdiĝas kompreneblaj manifestiĝoj.

3 poentoj

La lingva manifestiĝo de la ekzamenato kvankam gramatike kritikebla, tamen estas memstara kaj kontinua.

4 poentoj

En iu ajn ĉiutaga aŭ abstrakta temo li/ŝi kapablas komuniki kun malmultaj eraroj, kontinua kaj kun konvenaj parolturnoj.

5 poentoj

La ekzamenato kapablas gramatike ĝuste komuniki kun pretendema vorttrezoro en iu ajn temo konvene al la donita situacio.

VORTTREZORO

0 poento

Li/ŝi konas nur la plej bazan vorttrezoron, sed ankaŭ ĝin li/ŝi uzas komplete fuŝite.

1 poento

Li/ŝi havas malvastan vorttrezoron, li/ŝi konas nur vorttrezorajn elementojn, ilian aplikadon karakterizas multaj malĝustaĵoj.

2 poentoj

Lia/ŝia aktiva kaj pasiva vorttrezoro ne havas la konvenan amplekson.

3 poentoj

Li/ŝi kapablas ankaŭ pri abstraktaj temoj ekspliki siajn pensojn kun adekvata vorttrezoro, sed ofte neprecize.

4 poentoj

Liaj/ŝiaj vorttrezoro estas riĉa, stilo elektema kaj en la ĉiutagaj, kaj en la abstraktaj temoj. Malpli gravaj, sed ne komprenĝenaj eraroj ankoraŭ okazas.

5 poentoj

Li/ŝi komunikas preskaŭ senerare, multifacete kun idiomoplena vorttrezoro.

LINGVA ĜUSTECO

0 poento

Li/ŝi uzas simplajn, gramatikajn strukturojn kun buntaj eraroj.

1 poento

Lia/ŝia deponejo de gramatikaj strukturoj enhavas ankaŭ kelkajn pli komplikajn formojn, sed en la komunikado li/ŝi tre malĝuste aplikas ilin.

2 poentoj

Li/ŝi uzas kaj simplajn, kaj komplikajn strukturojn kun oftaj eraroj sen korekti ilin.

3 poentoj

Li/ŝi povas transdoni plejparton de siaj informoj gramatike ĝuste. Ĉe la uzado de pli komplikaj gramatikaj strukturoj kelkfoje sperteblas malcertiĝo.

4 poentoj

Li/ŝi varie aplikas ankaŭ pli komplikajn gramatikajn strukturojn kun maloftaj eraroj. La pretendemo de la aplikataj strukturoj proksimas al la gepatralingva normo.

5 poentoj

Li/ŝi faras malmultege da eraroj, ankaŭ tiujn nur en la komunikado kun pli komplikaj gramatikaj strukturoj. La uzado de kompleksaj tensoj proksimaj al la gepatralingvaj normoj.

PRONONCO

0 poento

La prononco de la voĉoj kaj vortoj, la akcento montras gravajn mankojn.

1 poento

En la parolo forte sentblas gepatralingva prononcmaniero, la prononco de la vortoj kaj la akcento de la frazoj estas malkorekta.

2 poentoj

Krom kelkaj esceptoj montriĝas gravaj malprecizaĵoj en la prononco.

3 poentoj

Nur kelkloke sperteblas malĝustaĵo en la prononco de la ekzamenato, la akcento pli-malpli proksimas al la normo.

4 poentoj

Lia/ŝia prononco nur kelkloke kaj nur en malgranda mezuro diferencas disde la gepatralingva prononcnormo. La kompreno kaj la komunikado ne havas prononcajn barojn.

5 poento

La ekzamenato komunikas en proksima aŭ sama nivelo de la gepatralingva normo. Lia prononco proksimas la gepatralingva normo.

PAROLKOMPRENO

0 poento

La ekzamenato eĉ en bazaj temoj ne komprenas aŭ miskomprenas la informojn.

1 poento

Li/ŝi malofte miskomprenas la komunikaĵojn, tial la interparolo ĉesas eĉ en pluraj temoj.

2 poentoj

Kun la kandidato eblas komuniki nur en ĉiutagaj temoj. Okaze de pli pretendeme vortumitaj komunikaĵoj la ekzamenato blokiĝas pro siaj mankoj en la kompreno.

3 poentoj

Ĝenerale en ĉiuj temoj li/ŝi kapablas sekvi la informojn, kvankam li/ŝi redemandas pri detaloj negravaj el la vidpunkto de la informo.

4 poentoj

Li/ŝi komprenas ĉiujn komunikaĵojn en ĉiuj temoj, kaze de redemandado li/ŝi vortumas en simpligita formo, eble tiel transportante sian malcertecon.

5 poentoj

La eminenta parolkompreno ebligas glatan komunikadon en ajna temo.

5-a ĉapitro

IDEOJ, PROPONOJ POR SINPREPARANTOJ AL LA LINGVOEKZAMENO

Ekzamenato kaj ekzamenanto ne estas malamikoj unu de la alia. Ili ambaŭ estas interesitaj, ke la lingvoekzameno okazu en agrabla etoso, la ekzamenanto elvoku la kiel eble plej bonan lingvan plenumon de la ekzamenato, kaj la ekzameno finiĝu kiel eble plej sukcese. Per la ĉi-subaj ideoj kaj proponoj ni intencas faciligi la situacion de la ekzamenatoj. Ni ŝatus forigi la superflujajn timojn kaj diskonigi spertojn, kiujn la ekzamenantoj de ITK konsistigis el la spertoj de multaj jaroj.

BUŜA EKZAMENO

La unuaj tri taskoj de la buŝa ekzameno (intervjuo, memstara temekspliko laŭ bildo, situacia rolludo) rolas en ĉiuj gradoj, ilin kompletigas en supera grado la interpreta tasko, respektive en meza kaj supera gradoj la laboratoria tasko mezuranta la parolkomprenon.

1. INTERVJUO

- Strebu konduki malstreĉite kaj nature.
- Dum la interparolo strebu vendi vin mem kaj vian direndaĵon. Neniel kontentiĝu per tio, ke vi respondas nur per jes aŭ ne, sed provu respondi al ĉiuj demandoj per 3-4 frazoj.
- Akceptu, ke en la ekzamensituacio vi rakontas pri vi mem al iu fremdulo ion, kion vi cetere ne malkovrus. Kiam vi eliras tra la pordo, la ekzameninto forgesas jam ĉion. La baz- kaj mezgradaj ekzamenoj ligiĝas al ĉiutaga vivo kaj al personaj problemoj, tial tiuj temoj ne estas eviteblaj. La ekzamenantoj rajtas malkovri la aŭditajn informojn al neni.
- En la superagrada ekzameno kalkulu ankaŭ pri demandoj el la aktualaj tagaj novaĵoj kaj ĝeneralaj kulturaj demandoj.
- En Esperanto la ekzamenantoj povas demandi en ĉiuj gradoj ankaŭ pri la historio de la lingvo kaj aktualaĵoj de la Esperanto-movado.

2. MEMSTARA TEMEKSPLIKO LAŬ BILDO

- Konscie vi elektu la bildon, ne laŭ estetikaj vidpunktoj. Decidu precipe laŭ tio, pri kiu bildo vi povas pli multe diri, respektive pensu ankaŭ pri tio, ĉu post la priskribo de la bildo vi povos kontinue paroli pri la temo de la bildo, ĉu vi povos prezenti konekse kun ĝi viajn pensojn, asociadojn kaj sentojn, krom tio pripensu ĉu vi havas pro tio la bezonatan vortrezoron.
- Provu paroli seninterrompe 3-4 minutojn pri la bildo tiel, ke vi difinu unue la temon en unu frazo, kvazaŭ donante titolon al la bildo. Poste parolu kontinue: kion ĝi prezentas (sed ne eniru en superflujajn detalojn, kaj precipe evitu mencii tiujn aferojn kaj nociojn, kies fremdlingvan ekvivalenton vi ne konas), poste resumu viajn memorojn, pensojn, asociadojn, kaj argumentu, kial ĝuste tiuj pensoj venis al vi en la kapon.
- Se mankas ideoj, vi povas diri ĝeneralaĵojn konekse kun la bildo, sed ne kontentiĝu pri tio, ke vi rakontas la pli-malpli konvenajn partojn de la lernolibro parkerigitajn hejme, sed provu la direndaĵon konkrete apliki al via propra vivo/situacio.
- Ne atendu la helpon de la ekzamenanto, li starigas helpajn demandojn, nur se vi ne plu povas ion diri pri la koncerna temo, sed dume via lingva plenumo ne estas mezurebla. Kalkulu je tio, ke la pensoj kaj demandoj de la ekzamenanto estas diferencaj disde la viaj, kaj ne lasu, ke tio vin konfuzu!
- Tiun ĉi taskon valoras ekzerci ankaŭ dum la hejma/lerneja sinpreparo, inter alie kadre de la ludo nomata “Nur unusolan minuto”, kiam pri hazarde elektita temo vi parolas dum unu (poste pluraj) minuto(j) tiel, ke vi ne ĉesas kaj ne deflankiĝas de la temo, aŭ ripetas frazo(j)n.

3. SITUACIA ROLLUDO

- Ne traduku la tekston sur la tiritita slipo, ne tio estas via tasko.
- Post atentema tralego de la situacia priskribo, imagu vin en la situacion kaj komencu ludi.
- Provu solvi ankaŭ situacion, kiun vi ne farus en la reala vivo (ekz. reklamaciuj en restoracio, se la supo estas malvarma).
- Vi ne estas en ekzameno de memorkapablo, do trankvile vi povas vidi la slipon ankaŭ dum la ludo, tamen atentu pri tio, ke ne ekestu kurcirkvito inter vi kaj la papero. Vi ne povas kaŝi vin en la papero, do ne forgesu, ke vi rolludas kun la ekzamenanto.
- Vi povas elaste formi vian rolon, sed vi ne tro forlasu ĝin, reiru al konkretaj preskriboj, sed ne ligu strikte al la detaloj.

4. INTERPRETA TASKO (NUR EN SUPERA GRADO)

- Strebu kapti la esencon de la du fojojn aŭskultita mallonga novaĵo/historio kaj kohera resumi ĝin en la fremda lingvo.
- Ne temas pri memoro-testo, do ne timigu, se pri tiu aŭ alia detalo vi ne memoras precize, multe pli gravas, ke logike, kompreneble rakontu, kion vi aŭdis.
- Valoras prepari vin al tiu ĉi tasko ankaŭ tiel, ke mallongajn novaĵojn, anekdotojn, historiojn vi strebas tuj transigi en la fremdan lingvon. (Eble vian parolon surbendigu, tiel vi povas kontroli vian lingvan plenumon.)

5. LABORATORIA TASKO MEZURANTA LA PAROLKOMPRENON

- Dum la unua aŭskulto de la teksto vi strebu ĝenerale kompreni la tekston lasante la detalojn (en meza grado ankoraŭ du fojojn, en supera grado ankoraŭ unu fojon vi aŭdos ankoraŭ la tekston).
- Ne timigu, se vi ne tuj komprenas ion tuj ĉe la unua aŭdo, ne gluiĝu al la detaloj, ĉar el la kompleta historio vi povas elŝeligi ion, kion vi en si mem eble ne komprenis klare.
- Se vi sentas, ke iun certan informon vi povas skribi al pluraj demandoj, prefere vi skribu la respondon al pluraj lokoj.
- Se eble koncentru vian atenton ne pri nomoj kaj numeraloj, sed pri esenca enhavo.
- Tre atente tralegu la demandojn, kaj el la aŭskultita teksto laŭ ili strebu kolekti la informojn.
- Dum la aŭskultado de la teksto prefere ne skribu, ja estas tre malfacile samtempe aŭskulti (kompreni) kaj noti.
- Strebu respondi al ĉiuj demandoj.
- Se la demando estas kunmetita (ĝi koncernas plurajn aferojn, aŭ rolas en ĝi kial kaj kie?), donu respondon al ĉiuj demandoj.
- Per la respondoj eblas kolekti entute 15 poentojn, tio signifas 15 informojn. Do, al kelkaj demandoj la ĝusta respondo estas doni 3-4 aŭ plurajn informojn.
- En la respondo ne ripetu la tekston de la demando.

SKRIBA EKZAMENO

1. BAZA GRADO

La skriba ekzameno en la baza grado konsistas el tri partoj.

1.1 TASKO MEZURANTA LA LEGKAPABLON

- En tiu tasko vi devas hungare respondi al hungarlingvaj demandoj post la tralego de broŝuro, prospekto, varpriskribo aŭ simila eldonaĵo.
- Vi ne devas per vortaro kontroli la tutan tekston kaj traduki ĝin, ĉar se iu strebas al tio, tiam li/ŝi verŝajne prodigas el la tempo eĉ donante seneraran solvon al tiu ĉi unua tasko, la 40 poentoj ne sufiĉas al la sukcesa ekzameno, se vi ne havos jam tempon por la aliaj du taskoj.

- Estas konsilinde unue tralegi la tekston, eĉ se ni ne ĉion komprenas, poste analizi la demandojn, poste reirante serĉi en la teksto tiujn partojn, kiuj povas doni la respondon al la demandoj.
- La signifon de tiuj vortoj, kiuj aperas plurfoje, kaj kiuj gravas por trovi la respondojn, valoras malkovri per la vortaro.
- Ĉe la vortumado de la respondoj strebu kompakte kaj unusence vortumi, ofte sufiĉas mencii la informojn en gvidvortoj.

1.2 TASKO MEZURANTA LA LEG- KAJ SKRIBKAPABLON

- La dua tasko estas plenigi formularon.
- Atentu pri la instrukcioj, kaj faru la plenigon laŭ ili, sed povas esti ankaŭ demandoj, kie vi povas libere elekti la respondon.

1.3 TASKO MEZURANTA LA SKRIBKAPABLON

- La tasko estas skribi leteron.
- Atentu pri la instrukcioj, kaj tiel skribu la leteron.
- Strebu al simplaj pensoj kaj al simpla vortumado. Ne trokomplikigu la tekston per informoj, kiujn vi ne povas bone redoni en la fremda lingvo. Prefere uzu tiujn esprimojn kaj parolturnojn, kies uzon vi jam konas. Se vi sentas, ke ion vi ne povas ĝuste esprimi, provu vortumi prefere alimaniere. Ne strebu senmanke traduki viajn pensojn, vi povas ŝanĝi ilin.

2. MEZA GRADO

La mezgrada ekzameno konsistas el kvin partoj.

2.1 RESPONDELEKTA TESTARO

- Unue solvu tiujn demandojn, ĉe kiuj vi plene certas pri la ĝusta respondo, nur poste cerbumu pri la problemaj punktoj.
- Se vi ne certas pri la ĝusta respondo, unue sarku la komplete maleblajn respondojn, poste cerbumu pri la restintaj 2-3, kaj pritaksu, kiu povas esti la plej ĝusta en la koncerna teksto.
- Strebu solvi ĉiujn punktojn, ja ĉie vi havas 25%-ojn da ŝanco.
- Fremdan lingvon ne eblas ellerni nur per la solvado de testoj. Se dum la ekzerco vi plenumas daŭre sub la necesaj 60%-oj, tiam ne elektu la solvon, ke vi tage-nokte solvas testojn, sed provu evoluigi vian lingvoscion alimaniere.

2.2 TRADUKO DE HUNGARA TEKSTO EN FREMDAN LINGVON

- Tiu ĉi tasko baziĝas sur la kontrastiveco, tio estas sur la formaj, naciaj kaj pensmanieraj diferencoj inter la gepatra kaj fremda lingvoj. Tial dum la solvo strebu pensadi ne hungare, sed en la fremda lingvo.
- Atentu pri la interligo de la teksto (vi tradukas ne sendependajn frazojn).
- Kvankam frazoj estas tradukeblaj en pluraj manieroj, tamen prefere ne donu plurajn variaĵojn, sed elektu la tradukon laŭ vi plej konvenan.
- Fidu vian vorttrezoron, kaj ne serĉadu kontrolante ĉion en la vortaro, ĉar vi povas elgliti el la tempo.
- Lernu la vortaruzadon ne en la ekzameno, sed jam antaŭe, kiam vi havas sufiĉe da tempo por tio. (Nepre estas grave koni parkere la alfabeton de ambaŭ lingvoj.)
- Iuj vortoj havas plurajn signifojn; tute ne estas certe, ke la unua estas tiu, kiun vi bezonas. Kontrolu la tekstoĉirkaŭaĵon, kiu vorto pleje konvenas tie.

2.3 DIREKTITA VERKADO

- Vortumu tiun ĉi taskon adresite! Imagu por vi la koncernulon dum vi konceptas.
- Verku koheran, vivecan tekston (ne kontentiĝu per nura traduko de la instrukciaj vidpunktoj)!

- Pri la koncerna temo strebu ekspliki vian opinion klare kaj logike, ĉar tiel vi povas akiri pli da poentoj pro la enhavo de la verketo ol tiu, kiu ne havas veran direndaĵon kaj nur nombradas, ĉu la vicoj jam sufiĉas al la postulata amplekso.
- La plilongigo de la amplekso ne kreskigas la valoron de la vortumaĵo, skribu nur tiom, kiom sufiĉas kaj necesas, sed kun postulemaj vorttrezoro kaj direndaĵo.
- Skribu nur pri unusola el la donitaj du temoj (pri tio la atenton cetere alvokas ankaŭ la instrukcio)!

2.4 TRADUKO EL LA FREMDA LINGVO

- Ĉiam unue tralegu la tutan tekston antaŭ ol ektraduki ĝin! Tiel vi havos kompleksan bildon, pri kio temas la teksto, kaj tio povas helpi kompreni frazojn, kiuj memstare estas eventuale malfacile kompreneblaj.
- La traduko de la titolo – se ĝi ŝajnas enigma – povas resti kiel lasta post la fintraduko de la artikolo, ja ofte post la finfaro de la tasko estas eble pli facile kapti frapan, hungaran titolon esprimantan la esencon de la teksto. Tamen ne forgesu traduki la titolon, ĉar ĝia manko kaŭzas perdon de poento.
- La direndaĵon de artikolo ĝenerale resumas la unua alineo, tio estas karakterizaĵo de la gazetara lingvouzo. Ne timiĝu, vi rajtas dispecigi la unusolan frazon serpentantan eĉ tra 3-4 vicoj. Trankvile uzu kun- aŭ subordinatajn propoziciojn, tamen atentu, ke la enhavo de la teksto restu nedifektita!
- Indas unue trovi la subjekton kaj predikaton de ĉiu frazo, respektive kapti la t. n. kernofrazon (la plejble mallongan klare kompreneblan frazon). Poste vi povas plurafini la opajn frazojn: trovante la koherajn partojn (eĉ sendepende de la signifo, nur laŭ la gramatiko) konstati la strukturan hierarkion!
- La vortaro ne enhavas ĉiujn eblajn, fajnajn signifojn de la vortoj. Tiuokaze valoras konsulti la koncernan vorton ankaŭ en unulingva vortaro, kiu plene klarigas la kompletan signifon, krome ankaŭ la tie prezentataj modelfrazoj povas helpi la trafon de la ĝusta hungara esprimo. Uzu vian saĝan menson, kaj elektu tiun esprimon, kiu plej trafe konvenas en la koncerna teksto (ĉirkaŭaĵo), kaj kiu plej bone helpas kompreni la hungaran tekston.
- La nomo de la gazetoj ne tradukendas, precipe ne, se ĝi rolas sub la teksto, kiel fontindiko. Tamen la nomon de institutoj valoras traduki, precipe, se ili havas parulon en la hungara. Se ili malhavas tion, skribu apud la fremdlingva nomo la hungaran (laŭvortan) tradukon inter krampoj.
- Via traduko estu libera, sed ne leĝera, t. e. nur tiom ĝi foriĝu de la originala teksto, ke ĝi sonu laŭ normoj de la hungara lingvo, sed atentu pri la enhava fideleco!
- Traduku per hungaraj vortstrukturoj klare, vi ne strebu fari pli: la lingvoekzameno ne estas ekzameno pri tradukarto.
- Post la malneta traduko de la teksto tralegu denove la hungaran varianton! Laŭ la grandaj interrilatoj strebu klarvidi la tekston, kaj ne gluiĝu al la opaj vortoj! Decidu per racia saĝo, ĉu via tradukaĵo en si mem (sen la fremdlingva teksto) konvenas, ĉu ĝi formas kompreneblan, koheran unuon! Se ne, tiam alĝustigu la miskompreneblajn (aŭ malbone tradukitajn) partojn!

2.5 KOMPREENO DE LEGATA TEKSTO

- En tiu tasko ne estas necese traduki la tutan aŭ iujn partojn de la fremdlingva teksto, sed vi devas pruvi per hungarlingva respondo al hungarlingvaj demandoj, ke vi ĝenerale kaj ankaŭ en la partoj bone komprenis la tekston.
- Al la demandoj vi nepre respondu hungare (kiel legeblas en la apudtaska instrukcio)! Pro la fremdlingvaj respondoj akireblas minusaj poentoj.
- Dum la solvo de la tasko oni alterne uzas la teknikojn de rasta legado (kiam oni travidas la tutan tekston) kaj de la identiga legado (kiam oni kaptas la serĉatan informiĝon kaj analizas ĝin).
- Estas profitige unue tralegi la tutan tekston, kaj konsideri la komunikaĵon pri la starigita temo. Uzu vortaron nur se vi blokiĝis aŭ malfirmiĝis pri la ĝenerala kompreno. La tekstoj ofte enhavas konfrontadon de opinioj, do estu via unua paŝo, ke vi konstatas, pri la starigita temo kiu kiel opinias.
- La titolon vi ne devas traduki, tamen ĝia enhavo povas helpi la komprenon de la tuta teksto. La reala signifo de la titolo eble malfermiĝos nur post la ekkono de la kompleta teksto, ĝis tiam ne valoras malĉifri ĝian ofte enigme koditan mesaĝon.

- La tasko ne estas tradukado, sekve por vortumi la respondojn vi ne devas redakti la informaĵon per traduko de sinsekvaj frazoj, sed ofte la bezonata informo estas kaŝita en pluraj lokoj de la teksto. Ne estas permesate kroĉiĝi nur al unusola tekstoparto, sed vi devas kolekti la dissemita(j)n informo(j)n.
- Post la tralego de la demandoj estas konsilinde signi per ciferoj en la teksto, kiuj informoj apartenas al kiu demando. Nur poste komencu vortumi la respondojn! Strebu koncize transdoni la esencan informon, la respondon vi ne devas vortumi en kompletaj, rondaj frazoj, sufiĉas nur titelvorte, en elipsaj frazoj, sed kompreneble formuli same, kvazaŭ vi farus notojn.
- Ne revertumu la demandon en la respondo, pro tio vi ne havos poentojn, sed vi perdas tempon.
- Atentu pri tio, ke vi vortumu en la respondoj sufiĉe da gravaj informoj. Vi povas preni el la teksto minimume 20 informunuojn valorantajn po 1 poento, kiuj reale spegulas la ĝeneralan tekstokomprenon. Ofte montras apud la opaj demandoj la riceveblaj poentonombroj, kiom da informajoj serĉi.
- Pro la travidebleco sekvu la numeradon de la demandoj ankaŭ en la respondoj. Skribi redundajn, t. e. samajn informojn al pluraj demandoj estas superflue, ĉar poento akireblas nur ĉe unusola demando.
- Ne klarigu, ne komentariu la tekston, pro tio vi ne ricevos poenton, sed se vi misklarigas ion, vi povas perdi poenton (kaj tempon).
- Sen ampleksa, pasiva vorttrezoro kompreni tekston estas malfacile. Ni alkitimiĝu al regula gazetlegado kaj en la gepatra, kaj en la fremda lingvoj. La enhavon de la legita teksto ni provu ankaŭ hungare, adekvate rakonti tiel, ke ĝin komprenu ankaŭ tiu, kiu ne legis la originalan artikolon.

3. SUPERA GRADO

Ankaŭ la superagrada ekzameno konsistas el 5 taskoj. La ideojn kaj proponojn kolektitajn ĉe la mezgrada ekzameno evidente ankaŭ ĉi tie vi povas utiligi, sed por la supera grado ni aparte alvokas vian atenton pri kelkaj, plusaj, uzeblaj konsiloj.

3.1 RESPONDELEKTAJ TESTOJ

- La superagradaj testoj grave diferencas disde la mezgrada: la proporcio de la leksikaj (vorttrezoraj) kaj gramatikaj taskoj estas 3:2, kaj ankaŭ la gramatikaj testoj estas pli malfacilaj. Do, por sukcese solvi la testojn strebu ampleksigi vian vorttrezoron ekzemple per legado kaj/aŭ per la solvo de taskoj por evoluigi la vorttrezoron.

3.2 FREMDLINGVA KONCIZIGO DE HUNGARA TEKSTO

- La tasko pri koncizigo devas samtempe kontentigi du pretendojn: racie trovi la esencan de la teksto kaj kompreneble resumi ĝin hungare, poste transigi ĝin al la fremda lingvo (ĉ. en la duona amplekso de la hungara). Strebu do, la gravajn informojn de la teksto aranĝi en kohera teksto logike konstruita.
- Dum la tralego de la teksto koncentru al la 5 demandoj, ja ilia prirespondo povas doni la spinon de la resumo.
- Bona koncizigo similas al bone verkita, esencokapta gazetartikolo.
- Resumado ne estas tradukado, tial ne proponendas traduki la ekstremajn esprimojn, vortludojn kaj malfacilajn kunmetitajn frazojn, sed anstataŭ tio strebu redoni per aliaj vortoj la informojn. Ekzamenatoj ofte falas en la kaptilon, ke ili plene tradukas la pli malfacilajn partojn de la teksto. Tio estas en ordo, se ili faras perfektan (kaj rapidan) laboron, sed se ne, ili povas fari multe da eraroj, kiuj malpliigas la akireblajn poentonombrojn (tamen ne tiom, se aperus tiuj samaj eraroj en pli simplaj frazoj).
- Dum la pritakso de la resumajo la korektantoj priatentas tri vidpunktojn: la enhavon, la esprimmanieron kaj la lingvan ĝustecon.
- Dum la koncizigo konsideru la ĉi-suprajn vidpunktojn tiel, ke vi starigas la sekvajn demandojn:

Enhavo:

Ĉu vi tuŝis ĉiujn 5 demandojn?

Ĉu la informaĵoj estas kompreneblaj sen legi la originalan tekston? Se ne, kiugrade ĝi malfacilas?

Esprimmaniero:

– Ĉu vi uzis la taŭgajn vortojn, prepoziciojn kaj prepoziciajn verbojn? Se ne, kiugrade ili malfaciligas la rapidan komprenon de la teksto?

– Ĝis kiu limo ni flankeniris de la stilo de la originala teksto? Ĉu la koncizigo estas tro leĝera aŭ tro oficialska kompare kun la originala teksto?

– Ĉu la frazoj kaj alineoj formas koheran unuon, aŭ anstataŭ logika konstruo vi nur sinsekve respondis al la starigitaj demandoj?

Lingva ĝusteco:

– Ĉu vi uzas ĝuste la gramatikajn kaj sintaksajn konstruojn?

– Ĉu vi ripetas erarojn?

– Kiugrade estas gravaj la gramatikaj eraroj, kaj pro ili kiugrade estas la teksto miskomprenebla, grincanta aŭ nekomprenebla?

– Ni daŭre konsciu, ke tiu ĉi tasko estas superagrada, skriba tasko. Tute ne certas, ke la koncizigo – kiun vi konsideras bona – respondas al la pretendoj de la supera grado. La posedantoj de la superagrada lingvoekzameno estas kapablaj uzi supergrade la lingvon en sia laboro kaj sur ĉiuj kampoj de la vivo.

3.3 DIREKTITA VERKADO

– La temoj de la verketo estas oficialaj aŭ privatkarakteraj, ĉiutagaj aŭ prenitaj el la gazetaro.

– Ne sufiĉas respondi nur al la opaj instrukciaj vidpunktoj, via verketo devas pruvi ankaŭ pri bunta fantazio kaj varia esprimkapablo.

– Gravas, ke la verketo formu koheran tekston, tial oni devas certigi glatan transiron inter la opaj partoj.

– Valoras krom dulingvaj vortarojn uzi ankaŭ unulingvajn sinoniman aŭ tezaŭran vortarojn.

– Dum la vortumado de la verketo starigu la sekvajn demandojn (laŭ la tri vidpunktoj):

Enhavo:

– Kun kia efiko redonas la verketo la ĉefan pensolinion?

– Ĉu vi eksplikis klare la pensojn laŭ la vidpunktoj?

Esprimmaniero:

– Ĉu vi aperigis pretendeman vorttrezoron, ĉu vi sukcesis adekvate uzi ĝin en konvena ĉirkaŭteksto?

– Ĉu vi uzis variajn kaj pli komplikajn frazstrukturojn?

– Kiugrade vi certas pri ĝusteco de la uzitaj vortoj kaj esprimoj, ĉu ili bone kongruas kun la ĉirkaŭa teksto?

Lingva ĝusteco:

– La gramatikaj malkorektaĵoj kiugrade malhelpas la kompreneblecon de la verketo?

3.4 TRADUKO EL FREMDA LINGVO EN LA HUNGARAN

– La tradukendaj tekstoj estas aŭtentikaj el gazetoj, ĵurnaloj kaj sciencpopularigaj libroj.

– La tekstoj enhavas ankaŭ E-movadajn konojn, do la baza kono de la movado estas nepreterlasebla.

– En la supera grado la malfacilaĵojn kaŭzas plejparte semantikaj (prosignifaj) problemoj, kvankam ekzistas tekstoj, kiuj estas komplikaj prefere sintakse (frazkonstrue).

– Sur tiu nivelo bazpostulo estas ĝuste, klarsence vortumi, ĉar bone traduki eblas nur libere. Tamen atentu pri eventuala troigo, kiam povas perdiĝi la reala enhavo de la teksto. Ne sufiĉas nur transigi la informojn en la hungaran; vi devas ilin vortumi laŭ la pensmaniero de hungara lingvo.

3.5 KOMPREENO DE LEGATA TEKSTO

– En la supera grado la tekstoj estas pli longaj kaj pli malfacilaj kaj el gramatika kaj el vorttrezora vidpunktoj.

– En supera grado ne estas tempo por vortarumi la longan tekston, prefere strebu kompreni la koncernan vorton aŭ esprimon laŭ la unusenca kunteksto.

– En la respondoj tiun saman penson eblas vortumi plurmaniere.

– La akirebla poentonombro de la respondoj figuras ĉe la fino de la demandoj. Tio sugestas jam, kiom da informoj vi kolektu por la opaj demandoj.

– Kaŭzas deprenon de poento ĉiu miskomprenita informo, kiu influas la esencon de la artikolo. Se iu, pro sekurecaj kialoj, respondas pli detale (en la ĝusta loko), tio ne kaŭzas perdon de poentoj.

*Tradukita de Imre Szabó,
vicprezidanto
por Esperanto-ekzamenoj*